

# BEOGRADA VERDA STELO

## LA TRIA KONGRESO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ

Jaro V

KONGRESA NUMERO

n-ro 1a (12)

### DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

Antaŭ vi estas kongresa numero de **Beograda Verda Stelo**. Ĉi tio estas numero kiu enhavas ĉiujn fakajn prelegojn pri temo **Eŭropa integriĝo kaj Esperanto**. Aŭtoroj provis diri pli pri ekonomio, literaturo, scienco, informado, lernado, kunlaboro de vide handikapitaj homoj, pri strategio de Universala Esperanto Asocio rilate al Eŭropa Unio kaj Esperanto. Temo estas aktuala kaj tre grava por Serbio kiu planas fariĝi membro de Eŭropa Unio.

Eble en tekstoj de la prelegoj ekzistas iuj respondoj pri nia estonteco, pri la estonteco de Esperanto en Serbio kaj graveco de serbia Esperanto-movado en kadro de esperantistaj organizoj inter esperanta movado de landoj-ŝtatoj de Eŭropa Unio.

Certe, respondoj ne povas esti tute pravaj. Ni ne sufiĉe konas kompletan situacion en eŭropa esperanto-movado kaj nia movado en Serbio fariĝas pli maljuna, malmulte estas da junaj membroj, malmulte da novaj iniciatoj, ne ekzistas helpo de la ŝtato, lastaj ŝanĝoj en edukada sistemo ne promesas al nia movado pli bonajn tagojn.

Tamen, ni ne akceptas malvenkon!

**Eldonas**  
**Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado.**

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović,  
**Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Etelka Kiš Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoiljković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

**Ĉi tiu numero redaktis kaj teknike prilaboris**  
**Dimitrije Janičić**

**D-ro Pribislav Marinković**, aŭtoro de ĉi tiu verkaĵo, estas doktoro de ekonomiaj sciencoj, tradukisto, eldonisto, tre konata esperantisto, ĉefredaktoro kaj eldonisto de gazeto PRIMARA. Li estis membro de Esperanto-Instituto kaj beograda Esperanto-societo.

## EKONOMIAJ ASPEKTOJ DE LERNADO DE ESPERANTO KAJ EŬ

La rapida kresko de la produktaj fortoj de la nuntempa socio nepre gvidas al plivastigado kaj fortikado de ligoj inter ŝtatoj en politika, ekonomia kaj kultura senco. Scienc-teknika revolucio, reala fakto de la mondo en kiu ni vivas, ĉiam pli ekestas baza produktforto, influanta al la ekspansio de la monda merkato kaj al ligado de popoloj kaj ŝtatoj. Amasa produktado kaj fulmrapida produktiveco de laboro postulas sociigadon de produktado, disvolviĝanta, fakte, per merkato kaj per vastigado kaj progresado de labordivido. Ĉi tiu evoluo prezentas la objektivan fundamenton de procedo de ekonomia kaj politika integriĝo, ĉar malvastaj kadroj de unuopaj ŝtatoj estas transpasitaj. La internaciigo de ekonomia vivo, ruinigadoj de naciaj baroj kaj ekonomia proksimiĝo de naciaj merkatoj estas tre progresiva proceso, ĉar la matura kapitalismo iom-pos-iom transformiĝas al pli demokrata socio.

Kompreneble, ke en kondiĉoj de la moderna etapo de la monda ĉiufanka progreso, plejparte teknika kaj scienca, ĉi tiu tendenco al sociigado de laboro kaj reciproka interligado en unikan ekonomian tutajon, t.e. kreado de la monda ekonomiko, portas en si mem ankaŭ reakcian karakteron. Ĝin oni povas plej klare vidi en Eŭropa Unio, tute nova fenomeno en socia disvolvo en la dua duono de la 20-a jarcento, kie sendepende de kontraŭdiroj inter opaj integriĝintaj ŝtatoj, inter ili ekzistas klasa solidareco kaj amasa frateco en ilia batalo kontraŭ laborista klaso kaj ekspluatataj dungitoj, salajruloj kiel tutaĵo.

En ĉi tiu mallonga artikolo ni havas taskon esplori ĉu ekzistas lingva problememo en EU, ĉu ĝia estraro solvis ĝin, se vere ekzistas, aŭ tiu problememo pligrandiĝas? Kian solvon povas doni la internacia lingvo Esperanto? Kiomaj

profitoj havus loĝantoj de membroj-landoj kaŭze de tia revolucia solvo, akceptebla por la tuta planedo.

Kvankam la ideo pri Eŭropa unuiĝo estas malnova, kies radikojn oni povas sekvi post la tragikaj okazaĵoj de la Franca-prusa milito 1870 kaj la Unua mondmilito 1914-1918, tamen nur la 25-an de Marto 1957 ses landoj (Francio, Germanio, Italio, Nederlando, Belgio kaj Luksemburgo) en Romo subskribis t.n. Roma-n Kontrakto-n pri fondo de Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK). Oni tuj eksentis ke ekzistas grava problemo – lingva problemo. En Francio plejparte oni parolas la francan, en Germanio la germanan, en Italio la italan, en Belgio la francan kaj la flandran kaj en Nederlando la nederlandan (flandran). Do, en ses landoj oni parolis 4 lingvojn. De la komenco estas decidite ke la lingvoj de membroj-landoj fariĝu oficialaj lingvoj (Regularo de Konsilio n-ro 1 el 1958 kaj art. 21 de la Kontrakto pri fondo de EEK). La rezonoj estis en politiko de EEK cele estimi la rajton de milionoj da ĝiaj civitanoj konservi sian propran identecon, rajton pri scio, sed ankaŭ atingi videblecon. Nome, la leĝaro de EU estas publikigita en ĉiuj oficialaj lingvoj de la membroj-landoj, fariĝas nacia leĝaro kaj senpere estas deviga por ĉiuj civitanoj. Ĉiu civitano povas utili sian lingvon, kiam li sin turnas al la institucioj de UE, same kiel li tion faras en sia lando. Pro tio, ĉiu lando decidas, kiam aliras al EU, kiun el naciaj lingvoj deziras akcepti kiel la oficialan lingvon de EU, kiun poste akceptas ĉiuj membro-landoj. Ne ekzistas duoblaj standardoj inter grandaj kaj malgrandaj landoj nek inter pli bone konataj kaj malpli konataj uzataj lingvoj.

Kiam ekzistas kvar lingvoj tiam oni devas traduki, ekzemple, unue, el la franca al la aliaj tri: germana, itala kaj nederlanda; due, el la germana al la alia tri, trie, el la itala al la alia tri kaj el la nederlanda al la alia tri. Do, oni bezonas havi  $(4 \text{ foje } 3) : 2 = 6$  tradukaĵojn kaj 6 tradukistojn. La formulo estas:  $[n \times (n-1)] : 2$ , kie  $n$  = nombro de membroj-landoj, se oni konsideras ke unu tradukisto povas traduki unu lingvon al la dua kaj inverse. Tiu laboro estas grandega; oni devas tradukadi ĉiujn multnombrajn dokumentojn kaj interpreti ĉiujn multajn paroladojn en ega nombro de EU-organoj. Eĉ tiam, kiam estis nur kvar membroj ili nur teorie havis egalan rajton.

La evidenta mallogikeco de la lingva politiko de EEK/EU montriĝas post aldoniĝo de aliaj novaj lingvoj, ĉar la statuso de la oficiala lingvo malfortiĝas. La lingva problemo pligrandiĝas pli rapide ol nombrokresko de la membro-landoj.

Ĉiu pililarĝiĝo de Eŭropa integracio alportis novajn provokojn, rilatantaj al novaj kaj al malnovaj membro-landoj, sed ankaŭ por funkciado de Komunumo entute.

La unua pililarĝiĝo okazis nur en 1973, kiam aliro de Granda Britio, Irlando kaj Danlando, „sesopo“ fariĝis „naŭopo“. Norvegio ne aliĝis en EU, post referendumo, kiam 53,5% da voĉdonantoj voĉdonis kontraŭ. Tiam oficialiĝis la dana kaj la angla, kiun oni parolas ankaŭ en Irlando. Anstataŭ kvar lingvoj la oficialaj lingvoj estis ses. Nun bezonis laŭ supre donita formulo:  $(6 \times 5) : 2 = 15$ . La lingvoproblemo fortiĝis, ĉar anstataŭ 12 tradukaĵoj bezonis 30. Eŭropa Komunumo funkciis naŭ jarojn kiel „Eŭropo de naŭopo“.

La dua plivastiĝo de Komunumo estis en 1981, kiam membriĝis Greklando kaj oni oficialigis la grekan. Entute estis 7 lingvoj. La nombro de la oficialaj tradukaĵoj kaj interpretajtoj kreskis je 21.

La tria disvastiĝo okazis en 1986. Novaj membroj fariĝis Hispanio kaj Portugalio. Tiuj du landoj atendis preskaŭ naŭ jarojn komence de la tago, kiam ili faris postulon por akcepto en la membreco. La Komunumo entenis dekdu ŝtatojn kun du novaj Romanaj lingvoj, tiel la lingvonombro kreskis al 9, kaj bezono por tradukaĵoj estis 36.

La kvara pililarĝiĝo, nun jam kiel Eŭropa Unio (EU) okazis, la unuan de Januaro 1995, kiam aniĝis ankoraŭ tri landoj: Aŭstrio, Svedio kaj Finnlando. Norvegio denove ne aliĝis post negativa referendumo de ĝiaj ŝtatoj. Tiamaniere EU de tiam nombras 15 membro-landojn, sed nur du lingvoj, la sveda kaj finna, grandiĝis lingvonombro al 11. La akcepto de Aŭstrio aliris al la plej grandaj rezistoj ĉefe pro la politiko de daŭra neŭtraleco, sed per diseriĝo de Sovet-Unio tiu politiko ne plu estis deviga. Feliĉe ke Aŭstrio ne komplikis la lingvan problemon, ĉar ĝia ŝtata lingvo estas la germana. Tamen la problemoj de komprenado en EU kun 11 oficialaj naciaj lingvoj fariĝis preskaŭ nebla kaj enorme altigis laboron, kostojn, tempon kaj entute funkciadon. Por tradukado kaj interpretado oni bezonis po 55 tradukistojn kaj interpretistojn.

Ĉe la komenco de la XXI jarcento EU staris antaŭ la historia provo koncerne plivastiĝon per la eksaj socialismaj landoj de la Centra kaj Orienta Eŭropo kaj Okcidenta Balkano. La kvina plua kaj la plej granda plivastiĝo okazis post apenaŭ naŭ jaroj, en 2004. Aliĝis dek landoj: Hungario, Slovenio, Slovakio, Ĉeĥio, Pollando, Estonio, Letonio, Litovio, Cipro (greka parto) kaj Malto. Tiam EU havis 25 membro-landojn. Novaj naŭ naciaj lingvoj tute komplikis la situacion. Ekestis

grandega traduka institucio kiu forrabadas tro enormajn financajn rimedojn. La potenca armeo de altkvalifikitaj fakuloj kaj specialistoj, bonege pagitaj, laboregas tage kaj nokte, venkante milojn kaj milojn da paĝoj kaj milionojn da elparolitaj vortoj dum longaj multnombraj kunsidoj kaj kunvenoj de la EU-institucioj: parlamento, konsilantaroj, komitatoj, komisioj, konsilioj, juĝejo ktp. Tiuj dek landoj aldonis ankoraŭ naŭ lingvojn (Cipro uzas la grekan).

En 2005 jaro aldoniĝis la irlanda lingvo. Antaŭe Irlando siatempe deklaris la anglan lingvon, sed post energia postulo de irlanda amaso venkis la nacia sento. Tiel en EU ekfunkciis 21 lingvoj. Kiom da tradukaĵoj necesas? (21 x 20) : 2 = 210.

La sesa kresko de EU datiĝas kaj realiĝas en la 2007, kiam du Balkanaj landoj Rumanio kaj Bulgario, aliĝis al Eŭropa integracio. Nuna nombro de membroj landoj estas 27 kaj kun la rumana kaj bulgara lingvoj en Eŭropa unio ekzistas 23 oficialaj lingvoj. La armego de tradukistoj elkreskis ĝis (23x22):2=253. Sed plua demando estas: kiom da homoj bezonas la EU-administracio por unu traduko kaj unu interpreto? Ĉu la proklamita lingva politiko de EU estas vere estimo de egalrajteco de ĉiuj ŝtatoj (sed ne de popoloj, estas multe pli da etnoj en EU ol ŝtatoj!) kaj deziras konkrete, konvinkige aserti sian demokratecon kaj justecon? Ne ŝajne, sed certe, tiu politiko spite al ĉio, favoras nur unu lingvon kun pretendo firmigi kaj plifortigi, ankoraŭ iom da tempo, la plej fortan politikan, armean mondan potencon.

#### Pilarĝigo de EEK/EU kaj kvanto de lingvoj kaj tradukaĵoj

Jaro	Membroj	Ofic. lingvoj	%	Tradukaĵoj	%
1957	6	4	100	6	100
1971	9	6	150	15	250
1981	10	7	175	21	286
1986	12	9	225	36	600
1994	15	11	275	55	917
2004	25	20	500	190	3 167
2005	25	21	525	210	3 500
2007	27	23	575	253	4 216

En nuna momento tradukaĵoj kreskis 42-oble, dum la nombro de membroj landoj kreskis nur malpli ol 6-foje.

Nun estas tre videble ke oni ne povas akcepti nur unu nacian lingvon kiel komunan, en tre diversaj sferoj de aktiveco de la ekonomia integracio. Transformado de Eŭropa Ekonomia Komunumo al la totala integriĝo, politika, socia, ekonomia, kultura ktp., al Eŭropa Unio, nepre starigas demandon pri solvo de gravega, malfacila lingva problemoj en EU, enhavanta 27 ŝtatojn kaj 23 lingvojn, laŭ interkonsento kaj aprobita statuto, estas ke ĉiu ŝtato havas rajton uzi nur unu lingvon de la plej multnombra nacio en ĝi. Estimante demokratajn principojn eĉ la plej malgranda ŝtato obstine insistas al lingva sistemo, tre simila dum konstruado de Babela turo. La legendo diras ke dum ĝia konstruado la homoj ne povis interkompreniĝi pro lingva diverseco.

La principo laŭ kiu „unu ŝtato unu lingvo“ absolute, certe, ne estas demokrata solvo. En preskaŭ ĉiuj ŝtatoj ekzistas diversaj etnaj grupoj, parolantaj siajn proprajn lingvojn. Ili forte postulas egalrajtecon kadre de la propra ŝtato, same en EU. Tiel ĉiam pli laŭtaj voĉoj kaj postuloj de minoritatoj en la membrolandoj de UE, nome: la relative malgranda kataluna nacio revigligas sian latinidan lingvon post jardeko de premado fare de la hispania registaro sub la generalo Franko. La adapto de la eŭropunia regulo N-ro 1 de la jaro 1958 jaro ne nur agnoskis la irlandan kiel oficialan lingvon, sed ankaŭ aldonis novan kategorion de „kun-oficialaj“ lingvoj por la kataluna, eŭska kaj galega. La plenan statuson oni alvokas por la lingvoj kiel la kimra, skot-galea, la rusa, parolata de milionoj da homoj en EU. Same okazas kun la korsika kaj bretona. Kiel staras pri la cigana lingvo? En baldaŭa estonto novaj kandidat-lingvoj estos la kroata kaj islanda, kaj iom pli poste ankoraŭ kelkaj lingvoj de landoj el t.n. „Okcidenta Balkano“. Kiom da lingvoj agnoskos EU en la sepa ringo kiam Balkanaj landoj aliĝos: Serbio, Bosnio kaj Hercegovino, Montenegro, Makedonio, Albanio?

„Probable la egaleco de oficialaj lingvoj ĉiam estis fikcia“, diras Robert Phillipson en sia brila analizo „Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj“ („La angla venkas“ La Ondo de Esperanto 3/2010). Hodiaŭ, kun 23 lingvoj tio estas eĉ multe pli evidente. Hipokrizo certe regas en tiu sfero. Nenio estas tiel malfacile kiel kaŝi volon kaj altrudon de la plej granda potenco, reganta ekster EU kaj en ĝi. La franca estis la ĉefa lingvo dum la fruaj jaroj de EEK, kvankam la ger-

manoj plendis, ĉar germanaj interesoj suferis pro tio, ke la germana fakte ne havis la samrajtojn.

La ĉefuloj en EU konfesas ke la angla disvastiĝis je kosto de aliaj potencialaj pontlingvoj, aparte la franca kaj germana. La malpli internaciaj lingvoj de la ceteraj membro-ŝtatoj havas reale malmultajn rajtojn. Alivorte, estas silenta kaj sekreta akcepto de la hierarkio de la angla lingvo. En tia lingva stato kaj konfuzo ekzistas reala risko favori la lingvan kriterion kontraŭ la kvalifikoj aŭ komunikkapabloj. Dafydd ab Iago el Bruselo skribas ke „la lingva dominado de la angla povas havi kulturajn kaj politikajn efikojn“.

Ĉu vere la angla lingvo venkis en EU? Se estas ricevita unu batalo, tio ne signifas ke ĝi estas fina venko. La adeptoj de la Internacia lingvo ne sidas kun krucigitaj manoj! La potencoj en EU jam agnoskis, ne nur ekziston de ankoraŭ unu utila lingvo, sed „egaligis“ Esperanton kun la aliaj. Estas bone konate ke funkciuloj kaj administrantoj en EU devas, krom sia gepatran lingvon, bone regi ankoraŭ du lingvojn. Multaj tre kapablaj kaj junaj homoj malofte bonege konas, krom unu „monda lingvo“, ankoraŭ unun. Por perfekte paroli kaj skribi iun ajn nacian lingvon oni bezonas almenaŭ kelkajn jarojn. Pro tio multaj junaj homoj, havantaj ĉiujn aliajn preferencojn, krom scipovo pri du „mondaj“ lingvoj, decidis ellerni Esperanton dum tre mallonga tempo. Ekzemple, nur en Hungario (kies gepatra lingvo ne apartenas al la eŭropaj grandaj lingvoj) pli ol ses mil da kandidatoj ellernis la Internacian lingvon, faris lingvan ekzamenon ĉe universitato - filologia fakultato, kaj kun diplomo kaj atesto, akiris eblecon labori en diversaj institucioj de EU. *Epur si muove* kaj *El fajrero ekflagros flamo* siatempe parolis la grandaj kaj prudentaj sciencistoj.

Unu komuna lingvo vere estas necesa el multaj aspektoj: por pli bona kompreniĝo, elekto de estraranoj, ne laŭ scio de fremda lingvo, sed laŭ faka kompetenco, grandega ŝparado je kostoj por tradukado, interpretado, materiaj kostoj, egalrajtaj rilatoj inter nacioj kaj ŝtatoj ktp. La unika solvo estas enkonduki neŭtralan, relative facilan, belsonan kaj precizan lingvon. Grandega ŝparado okazus ne nur en klerigado sed ankaŭ en scienco, kulturo, ekonomio kaj ĉiuj aliaj sferoj.

Eŭropa Unio, diference de la aliaj multnombraj internaciaj organizoj, sed ankaŭ de la aliaj ŝtatoj, estas plurlingva. En nuntempo ekzistas 23 oficialaj lingvoj, dum Unuiĝintaj Nacioj havas nur ses, sed Konsilio de Eŭropo kaj NATO publiki-



gas oficialajn dokumentojn nur en la angla lingvo. El lingva demokratio en tiuj organoj mankas eĉ la letero „D“. De la komenco en EU estis decidite estimi rajton de 500 milionoj da loĝantoj (en 2006). Kaŭzojn oni povas trovi en determino de EU por gardi proprajn identecon, rajton al scio, sed ankaŭ al akiro de videbleco. La lernado de lingvoj en plurlingva Eŭropo malfermas pordon al opulo al pli bona kariero, vivokondiĉo, studo kaj laboro ekster sia lando, kaj aliflanke tio estas unu el formoj de bataloj kontraŭ rasismo, ksenofobio kaj netoleremo. Paroli la lingvon de la alia membro-lando signifas ekkoni ĝian historion, kulturon, alproksimiĝi sin al ĝia popolo, efektivi unuecon. Sed la aktuala programo „gepatra lingvo + du lingvoj“ ŝajne ne estas utopio (momente 26 procentoj de Eŭropanoj krom la gepatran parolas ankoraŭ du lingvoj), ĉar scio de *lingua franca* plu ne estas sufiĉe. Eble tiun programon faris iu filologo kiu tralegis libron de N. Ostler en kiu li citas Enije-n, grandan poeton el la frua Romana periodo: „Mi havas tri korojn“, ĉar li flue parolis la latinan, grekan kaj oskanan. Verŝajne ke propagandistoj de tiu programo ne hazarde preterpasis nekontestebajn faktojn ke en tiu procento troviĝas plejparte homoj, parolantaj du aŭ tri lingvoj de minoritatoj en ilia lando, kaj ke ili ne estas inter 23 oficialaj EU-lingvoj. Same ne estas signo de egaleco inter flue paroli kaj balbuti, paroleti. Kiom da tempo oni devas dediĉi al ellernado por bone paroli tri lingvojn. La ĉefa afero ke eĉ se ĉiuj loĝantoj de EU parolus po tri lingvojn (nur en la tuta EU estas pli ol 50 lingvoj, parolataj de ĝiaj civitanoj), ne ekzistus totala komprenemo inter institucioj kaj homoj!

Ĉu eblas elkalkuli la profiton se EU enkondukus Esperanton kiel oficialan lingvon en siajn multnombrajn organojn? Pri tiuj demandoj nia faka artikolo ne havas sufiĉan spacon por doni adekvatan respondon. La respondoj bezonas multe pli da scienca esplorado, tempon kaj spacon. Nur provizore dirite, ŝparado estas grandega, ne nur je kostoj de kvazi „internaciaj lingvoj“ sed por la tuta homaro, kaj unuarange por popoloj el EU.

Por efektiviĝi sian celon ke ĉiuj regularoj kaj juraj aktoj estu publikigitaj en 23 lingvoj kaj esti egale kredindaj kaj aŭtentikaj, la institucioj de EU - Eŭropa Parlamento, Konsilio kaj Komisiono havas siajn tradukantajn fakojn. Unu el la plej granda, Direktorejo por tradukado troviĝas en la kadro de Eŭropa Komisiono. En ĝi laboras ĉirkaŭ 1.650 permanentaj tradukistoj, 550 teknikaj personoj, kaj en 2004, estis tradukitaj 1 270 586 paĝoj. Tamen, oni devas scii ke la egala traktado,

kiun havas ĉiuj oficialaj lingvoj, ne signifas aŭtomate ke ĉiuj dokumentoj estas tradukataj al ĉiuj oficialaj lingvoj. Cele atingi kiom pli grandan efikecon, Komisio en interna laboro uzas la anglan, francan kaj germanan lingvojn, kaj ĉiuj lingvoj estas uzataj kiam oni komunikas kun la aliaj EU-institucioj, membroj kaj publiko. Pro la samaj kaŭzoj Eŭropa Parlamento disvolvigis sistemon de ses kontraktitaj lingvoj (la angla, franca, germana, itala, pola kaj hispana), kaj tiel dokumento en la slovakaj aŭ svedaj ne estos tradukita rekte al ĉiuj aliaj 22 lingvoj, sed nur kelkaj el ili, kaj poste denove traduki al la aliaj. Tiamaniere tradukistoj estas liberigitaj de devigo tradukadi, ekz. el la malta dialekto al la dana, aŭ el la estona al la portugala, ĉar estas tre malfacile trovi kvalifikajn tradukistojn. Se la tekstoj estus tradukataj rekte el ĉiuj oficialaj al ĉiuj aliaj, ekestus 253 bilaterala kombinaĵoj, kio estus neeble efektiviĝi.

La buŝaj tradukistoj, interpretistoj, uzas la similan sistemon kiam oni tradukas el 23 oficialaj lingvoj al 22 oficialaj lingvoj. Ekzemple, parolado en la finna estos tradukita unue al limigita nombro de t.n. lingvopontoj, kaj la slovena interpretisto inkludiĝas unue al iu el tiuj lingvo-pontoj sen bezono traduki rekte el la finna. Por kutima kunveno postulata plenan buŝan interpretadon el/al 23 lingvoj, ordinare estas engaĝitaj 70 tradukistoj.

La politikistoj, adeptoj de la angla lingvo, ofte opinias ke entute ne ekzistas lingva problemoj, ĉar la angla lingvo estas universala lingvo, la plej multe parolata en la mondo, kiu finfine venkis. Sed, ili ne devas forgesi la konkludon de la brita sciencisto kaj verkisto Nikolas Ostler, kiu studis en Oksfordo, diplomiĝis la grekan, latinan, filozofion kaj ekonomion, poste doktoriĝis sub mentorado de Noam Ĉomski, el lingvistiko en la fama Instituto pri teknologio en Masaŝusetoj (MIT), kaj utilas 26 diversajn lingvojn:

„La angla havis unikan okazon la unua utili disvolviĝo de novaj teknologioj, sed, ĝia estonto ne estas klara, ĉar la aliaj lingvoj, kiel grandaj tiel ankaŭ malgrandaj, okupas malrapide siajn poziciojn malantaŭ ĝi. La angla lingvo konfrontiĝas kun necerta estonteco, laŭ maniero kio okazas al homoj kiuj dum unu nokto ekestis famaj, kaj eble ĝia estonto havas la saman senkompatan rezulton, kiam havas vivoj de tiuj homoj. Unu el gravaj kaŭzoj por tio estas fakto ke por la lingvo, kiu estas la ĉefa monda *lingua franca*, la tuta koncepto de la lingva komunumo komencas ruiniĝi kaj detruigi“

Nura solvo de la lingva problemo en EU, kaj same en la terglobo, estas havi unu komunan lingvon, ekzistantan jam pli ol unu jarcento, ĝi estas lingvo: nenacia, neŭtrala, facila, tre konciza kaj esprimplena, komprenebla, belsona kaj vivanta, nuntempa, moderna kaj estonta, majstre artefarita, internacia, apartenanta al ĉiuj, sed al neniu aparte. Esperanto estas tia lingvo, kiu solvas lingvan problemon de Eŭropa Unio kaj de la tuta mondo.

Bonvolu, malkovru kaj ekkonu Esperanton!

(Literaturo:

**Pribislav Marinković**, *Ekonomiaj kaj financaj aspektoj de la integraciaj procedoj en Okcidenta Eŭropo*, Beograd 1979, „Savremena administracija“ /kun Esperanta resumo/;

**Dragana Kragulj**, *Ekonomio - fundamentoj de mikroekonomia kaj makroekonomia analizoj*, Beograd 2008;

**Nikolas Ostler**: *Carstva reĉi – Jeziĉka istorija sveta*, Beograd 2008, „Geo Politika“;

**Dafydd ab Iago**, *La angla venkas*, La Ondo de Esperanto, n-ro 3, 2010

**Aleksandra Raković**, *Уједињени, а различити*, Beograd, 2009, „Политика“.



Aŭtoro de ĉi tiu verkaĵo estas profesoro **Boriša Milićević**, longjara direktoro de Esperanto-instituto, tradukisto kaj esperanta aktivulo el Novi Sad.

## KONTRIBUO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ AL DISKONIGO DE KULTURO KAJ LITERATURO TRA EŬROPO KAJ LA MONDO, KAJ INVERSE, PERE DE IN- TERNACIA LINGVO ESPERANTO

### Ekesto kaj aplikado de Internacia lingvo Esperanto

Ekde ekesto de la unuaj homaj grupoj kaj kunumoj kaj ilia evoluo, iĝadis la neceso por kontaktoj kaj komunikado pro scivolemo kaj, pli grave, pro nepro por havigado de vivrimedoj. Kompreneble, por tio necesis lingvo por interkompreniĝo de du aŭ pluraj grupoj. Tiel aperadis iuj lingvoj de pli vasta uzado kun certa nombro de esprimoj por bezonataj interparoloj kaj interŝanĝo de varoj.

Dum plua evoluo de kulturo, scienco, komerco kaj turismo, la instruitaj homoj ĉiam pli sentis ke endus por uzado unu standarda lingvo por esprimado de ĉiuj aspektoj de interhoma, kaj sekve interpopola kunlaboro.

Fine de la 19-a jarcento estis kreita tiu dezirata standarda lingvo – **Internacia Lingvo Esperanto**. Ĝi estas neŭtrala, nealtrudita lingvo. Ĝin kreis D-ro L. L. Zamenhof el Pollando.

### E-lerniloj en Serbio

En Serbio oni frue perceptis la gravecon de tia internacia lingvo. Jam post kvin jaroj ekde apero de **la unua lernolibro de Esperanto** ekestis la unuaj esperantistoj en Serbio, kaj Esperanto ankoraŭ nuntempe vivas.

Oni bone komprenis ke Esperanto povas roli kiel perilo kaj pontolingvo precipe inter tiel nomataj malgrandaj lingvoj, kies kulturaĵoj kaj literaturaĵoj malfacile penetras tra la mondo pere de aliaj pli grandaj naciaj lingvoj.

Kaj tion la geesperantistoj de Serbio efektive pruvis per konkretaj rezultoj.

– **La unua E-lernolibro** en la serba lingvo aperis en 1908 en la urbo Krajujevac. Poste, dum jardekoj, ekestis multaj lernolibroj kaj vortaroj en nia lingvo, kaj la lasta de Stano Marček, **Esperanto direkta metoda** (Esperanto per rekta metodo), tradukita al la serba de Tereza Kapista, aperis en 2008.

– Dimitrije Janičić kunmetis **la vortaron Esperantan-serban** (6.800 vortoj) kaj prezentis rete.

– **La dudirekta vortaro** de Adem Jakupović, Mommčilo Ocokoljić, Marko Petrović estas eldonita en 2008 en Beograd.

### E-tradukado en Serbio

Multaj tradukoj de prozaĵoj, kaj plejparte poeziaĵoj, de serbiaj aŭtoroj, aperis en diversaj E-gazetoj kaj libroj. En formo de poeziaj kolektoj/antologioj estis eldonitaj 8 libroj:

– **Pesme ljubavi i rodoljublja – Kantoj de l' amo kaj patriotismo**. El Jugoslavia literaturo. Tradukis kaj redaktis Boriša Milićević. Dulingve. Stencilita. Kun 13 tradukoj de poemoj de 9 Serbiaj aŭtoroj. Dramski esperantski studio, Niš, 1965.

– **Lirika Poemaro el Vojvodino (Serbio)**. 64 tradukoj de poemoj de Serbiaj aŭtoroj (19 serblingvaj, 9 hungarlingvaj, 6 slovaklingvaj, 5 rumanlingvaj kaj 4 rutenlingvaj). Elektis, plejparte tradukis kaj redaktis Boriša Milićević.

Književna zajednica Novog Sada (Literatura Komunumo de Novi Sad), Novi Sad, 1983.

– **Antologio de la serba parola literaturo**. Elektis Negosava kaj Vladimir Đurović. Redaktis Živko Ivanović. 6 tradukintoj: Živko Ivanović, Milivoje Pavlović, Radojica Petrović, Ladislav Režek, Margareta-Greta Stoll, Nedeljka Subotić. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1991.

– **Svetu na dar**. Antologija srpske poezije za decu – **Al la mondo donace**. Antologio de la serba porinfana poezio. Izabrao, preveo i priredio (elektis, tradukis kaj redaktis) Zlatoje Martinov La libro estis proklamita de UEA kiel libro de la jaro 1996. Strategia, Beograd, 1996.

– **Antologio de la serba poezio (1200-2000)**. Kompilinto kaj ĉefredaktoro Srđ Arandelović. 284 poemoj de 92 aŭtoroj. 25 tradukintoj, el kiuj la ĉefa estis Margarethe-Greta Stoll. Serbia Esperanto-Ligo – Margarethe-Greta Stoll, Beograd, 1998.

– **Antologio de la serba skriba poezio.** Elektis Negosava Đurović, Vladimir Đurović, Živko Ivanović. Redaktoro kaj tradukinto Živko Ivanović. 83 poemoj de 55 aŭtoroj. Eld. Ž. Ivanović, Beograd, 2002.

– **Poeziaj donacoj.** Redaktis Boriša Milićević. 5 originalaj poemoj de 3 aŭtoroj, 11 tradukoj de poemoj de 6 aŭtoroj. B. Milićević tradukis 10 kaj I. Opačak-unu. Esperanto-societo "Marko Nešić", Novi Sad, 2003.

– **Bela Tibisko kaj bunta Vojvodino.** Redaktis Magdolna Revid (Rövid Magdolna). 1 originala poemo en E-o de Tibor Sekelj, 2 tradukoj de poemoj de serblingvaj aŭtoroj, 28 poemtradukoj de 17 vojvodinaj hungarlingvaj aŭtoroj. 10 tradukintoj. Esperanto-societo, Senta, 2008.

Aldone notindas jenaj tradukitaj libroj:

– David Albahari, **Eklampsio en remizo** (Fras u šupi). Rakontaro (Priče). Serbia Esperanto-ligo, Beograd 1990.

– Tibor Sekelj, **Temuĝin la filo de la stepo** (Temudžin – dečak stepe). Tradukis Tereza Kapista. Eld. de la tradukintino, Novi Beograd, 1993.

– Branimir Šćepanović, **Buŝo plena je tero** (Usta puna zemlje). Romano. Tradukis Antonije Sekelj. Eld. Terezija KAPISTA, Beograd, 1994.

– Petar Kočić, **Mrguda.** Rakonto. Tradukis Boriša Milićević. Dulingve. La originalo estas presita cirillitere (per la manskribo de la aŭtoro). "La Mondo", Banja Luka, 1996.

– **Razgovor u voćnjaku** (La Interparolo en la fruktĝardeno, de Igor Neverli). Prevela sa esperanta na srpski (Tradukis el Esperanto al la serba) Agnesa Eremija el Beograd. Eld. Multimedia-pres, Beograd, 2005.

– Milovan Stanković, **O ĉemu sanja cveće – Pri kio sonĝas floroj.** 69 pe-sama – poemoj. Tradukis Zlatoje Martinov, sekretario de Esperanto-Instituto. Dulingva eldono. Prometej, Novi Sad, 2009.

– Filip David, **Sonĝo pri amo kaj morto.** (Priĉa o ljubavi i smrti) Romano. Tradukis Agnesa Eremija. Interpress, Beogrado, 2009.

### **Tradukado el lingvoj de naciaj komunumoj (minoritatoj)**

Estas aparte interese ke oni laboris ankaŭ je tradukado al Esperanto el la lingvoj de naciaj minoritatoj. Tie Esperanto pruvas sian veran internaciecan rolon.

Estas jam menciitaj **Lirika Poemaro el Vojvodino**, kaj **Bela Tibisko kaj bunta Vojvodino**.

En la rutenlingva revuo **Шветлосц** (Lumo), n-ro 3, 2007 estis prezentitaj 15 tradukoj de poemoj de rutenlingvaj poetoj el Vojvodino.

La konata esperantisto Laslo Husar (Huszár László) tradukis en Esperanton du romanojn de Vojvodina hungarlingva aŭtoro Nandor Gion – **La kormoranoj ankoraŭ ne revenis** (A kárókatónák még nem jöttek vissza), Subotica, 1991, kaj **Salvo al nigra bubalo** (Sortúz egy fekete bivalyért), Zsoli Bt., 2008).

### Informado, kaj Turismo

Serbiaj geesperantistoj kontribuis ankaŭ informe kaj turisme.

En 1910 kaj 1911 aperadis dulingva gazeto **Srpski esperantista – Serba esperantisto**. Inter du mondmilitoj (ekde 1932) funkciadis la kuna gazeto **La Suda Stelo**, en kiu kunlaboradis pluraj serbiaj esperantistoj.

Post la dua mondmilito en Serbio estis kuntempe pluraj E-gazetoj/revuoj. Niaj esperantistoj kunlaboradas en diversaj E-gazetoj/revuoj tra Eŭropo kaj la mondo, same kiel pere de retoj.

Ekde la fino de 2006 aperadas en Beogrado la enhaviĉa revuo **Beograda Verda Stelo**. Ĉefredaktoro de la revuo estas D-ro Miodrag Stojanović, vicdirektoro de Esperanto-Instituto de SEL.

D-ro Pribislav Marinković aperigadas en Beograd interesan elektronan E-gazeton **Primara**.

Krome, pere de E-retlistoj informadas pri E-okazaĵoj en Serbio plejparte Dimitrije Janičić, kaj Boriša Milićević, Tereza Kapista, Renato Petrović...

En Serbio okazis 1 Universala E-kongreso (Beograd, 1973); 3 SAT-kongresoj (Beograd, 1956, 2006, Novi Sad 1969); 1 Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj (Beograd 2004), kaj la 5-a Sesio de DESKF (Danuba Esperanta Scienca kaj Kultura Forumo), (Beograd, 2001).

Ĝis nun estis skribe prezentitaj en Esperanto, en diversaj okazoj, tekstoj pri Beogrado, Subotica, Senta, Novi Sad, Jagodina, Čačak, Niš, Zaječar, Leskovac, Davolja varoš (Diabla urbo).

Senka Tomić prezentis rete **TURISMAN MONDON**.

### Originala E-verkado en Serbio

Menciendas ankaŭ unu aparta rimarkinda fakto. Temas pri ekzisto de la originala Esperanta literaturo el la tuta mondo. Ĝi ekzistas ankaŭ en Serbio. En



1961 en La Laguna aperis Jugoslavia originala E-poemaro **Reeĥoj**. En ĝi estas 24 originalaj en-Esperantaj poemoj de 8 aŭtoroj el Serbio.

En la kolekto **25 jaroj**. Antologio de Belartaj Konkursoj (HEA, Budapeŝto, 1977) aperis Vesna Skaljer-Race kun la poemo **Adiaŭo**, kaj Tibor Sekelj kun la rakonto **Neĝhomo**.

En **Esperanta antologio**. Poemoj 1887-1981 (UEA, Rotterdam, 1984) aperis 2 poemoj de Stevan Živanović (**La junaĝo, kaj La knabino**).

En **Trezoro**. Esperanta novelarto 1887-1986 (HEA, Budapeŝto, 1989) aperis la novelo de Srđ Arandelović **Sur dalmata fiŝistinsulo**.

Stevan Živanović (1900-1938) verkis poeziaĵojn, rakontojn kaj unu romanon – **Sonorilo de Bled**. Ĝi aperis dudekon da jaroj post lia morto, en Beograd, 1959. Tio estas la unua originala Esperanta romano en Serbio.

Menciindas almenaŭ kelkaj originalaj E-verkoj de serbiaj esperantistoj:

Branko Radaković, **Du noveloj**. Ĉe la malnova fajrejo, kaj Silva. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1955.

Božidar Trudić, **Provinca gastejo**. Rakonto. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1955.

Svetislav Petrović, **Sonetkrono por la esperantistaro**. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1957.

Vesna Skaljer-Race, **Maristo surmaste**. Poemaro. Eld. de la aŭtorino, Beograd, 1969.

**El la vivo**. Noveloj. Eld. de la aŭtoro, Beograd, 1977.

Marko Petrović, **Ilia tosto je nia kosto**. Poemaro. Eld. Zagreba Esperanto-Ligo, Zagreb, 1990.

Margarete Greta Stoll, Arandelović, **Miozotis (Neforgesumino)**. Poemaro. FES „Branko Maksimović”, Beograd, 2006.

Tereza Kapista, **Esperanto**. Lingvo de paco en Burundo – Afriko. Eld. de la aŭtorino, Beograd, 2006.

**Esperanto lingvo de paco en Irano**. Eld. de la aŭtorino, Beograd, 2007.

Endas noti ke la esploristo kaj vojaĝverkisto **Tibor Sekelj** verkis multajn interesajn librojn en Esperanto (prozaĵojn, sed ankaŭ poemojn), kaj ankaŭ tradukadis Esperanten el la serba lingvo.

En **Litetartura Foiro** aperis pluraj kontribuajtoj (poemoj, artikoloj, tradukoj) de Mgro Zlatoje Martinov, Boriša Milićević kaj Dimitrije Janičić kies poemoj estis aperigitaj ankaŭ en kelkaj rimarkindaj internaciaj en-Esperantaj revuoj.

### **Inversa efiko**

Ankaŭ inversa utilo de Esperanto por Serbiaj geesperantistoj estas tre inda. Nome, ili konatiĝis kun multaj E-gazetoj kaj libroj el diversaj landoj, kaj partoprenis diversajn internaciajn E-kunvenojn. Tio ne povis okazi tiom amplekse nur pere de aliaj grandaj naciaj lingvoj.

En 1989 Esperanto-societo "Marko Nešić", Novi Sad kaj Serbia Esperanto-Ligo, Beograd aperigis la antologion **Mi esperas amon**. El poezio de la nealiancaj landoj. Elektis, plejparte tradukis kaj redaktis Boriša Milićević. Ĝi entenas 31 tradukojn de poemoj de 26 aŭtoroj el 18 landoj de Afriko (8), Azio (8) kaj Eŭropo (2).

Sergije Kalčić verkis ilustritan libron pri siaj vojaĝoj tra la mondo **Planedo hejmlando de vojaĝanto I**. "Timok", Zaječar, 2000.

Literatura Foiro, Vraca (Bulgario) n-ro 219, 2006 prezentis tradukojn de 20 poemoj el 9 Afrikaj landoj (Angolo, Alĝerio, Sao-Tomeo kaj Principeo, Mozambiko, Verdka Respubliko, Eburbordo, Egiptio, Madagaskaro, Senegalio). La poemojn plejparte tradukis Boriša Milićević.

### **Scienc-faka agado**

Radoslav Gajić verkis serblingve kaj Gradina, Niš aperigis en 1980 la ampleksan kaj faktoričan libron **Živi jezik**. Eseji o komunikacijama i planskim jezicima (Vivanta lingvo. Eseoj pri komunikado kaj planlingvoj).

Tereza Kapista tradukis el Esperanto kaj aperigis la valoran libron de Maya-suki Sajonji el Japanio **Specijalna orijentalna božanstvena masaža**. Terapija nameŝtanja kostiju kuka gnječenjem – pritiskanjem (Orienta speciala Diina Masaĝo. Koksosto-ĝustiga Prem-kneda Terapio). Eld. de la tradukintino, Beograd, 1990.

– tradukis el Esperanto kaj aperigis la libron de Martin Kojc **Udžbenik života** (La lernolibro de la vivo). Origine la libro estis verkita en la germana lingvo kaj tradukita en Esperanton. Eld. de la tradukistino, Beograd, (1993).

– tradukis el Esperanto kaj aperigis la libron de Bruno Vogelmann **Novi Realizam**. Posledica novog razmišljanja (Nova realismo). Ankaŭ tiu ĉi libro estis

verkita en la germana lingvo kaj tradukita en Esperanton. Eld. de la tradukintino, Novi Beograd, 1996.

D-ro Miodrag Stojanovič aperigis sian artikolon **Esperanto kaj scienco** en Sennacieca Revuo, Parizo, 2008, kaj en Beograda Verda Stelo, Speciala numero, Beogrado, majo 2008.

Mgro Gvozden Sredić aperigis sian artikolon **Esperanto kaj la fervojo** en Beograda Verda Stelo, Speciala numero, Beogrado, majo 2008.

Dimitrije Janičić tradukis la traktaton de Anatolij Ŝejpak **Početak civilizacije** (Komenco de Civilizacio, 15-90 pp.)

Boriša Milićević tradukis la traktaton de Carlo Minnaja **Početak matematike** (Komenco de Matematiko, 91-216 pp.)

Ambaŭ traktatoj aperis en la libro **Istorijski razvoj nauke i tehnike – odabrana područja** (Historia eovluo de la scienco kaj tekniko – elektitaj kampoj), Banja Luka, 2008.

En 2009 estis tradukita el Esperanto en la serban lingvon la valora libro de Aleksandar Korŝenkov **Istorija esperanta** (Historio de Esperanto). Kuntradukis 14 esperantistoj. Finredaktis Adem Jakupović. Teknike aranĝis Dimitrije Janičić. Esperantsko društvo “Radomir Klajić”, Beograd, 2009. (La libro estas presita cirillitere).

Dimitrije Janičić verkis enhavplaĉan artikolon **Doprinos profesora Stojanovića međunarodnom esperanskom pokretu** (Kontribuo de Prof. Stojanović al la internacia Esperanto-movado). Ĝi aperis en **Mitološki zbornik 22** de Insitut za mitološke studije (Mitologia Kolekto 22 de Instituto por mitologiaj studoj), dediĉita al la 70-jara datreveno de lia vivo kaj al lia 50-jara scienca agado. La Kolekto estis publike prezentita la 6-an de majo 2010 en Beogrado.

### **E-Bibliografio en Serbio**

Bibliografia agado estas ankaŭ grava kampo, ĉar ĝi ebligas laŭorde evidenti E-bibliografiaĵojn en Serbio.

Ni prezentu kion ni atingis sur tiu ĉi kampo:

En **Leksikon pisaca Jugoslavije** (Leksikono de Jugoslaviaj verkistoj), I-IV, Matica srpska, Novi Sad, 1972, 1979, 1987, 1997, estas ankaŭ E-bibliografiaĵoj pri Serbiaj verkistoj.

Boriša Milićević, **Bibliografio de Esperanto-tradukoj el Jugoslavia literaturo** – Bibliografija previda na esperanto iz jugoslovenske književnoati, 1977-1983. Književna zajednica Novog Sada – Literatura Komunumo de Novi Sad, 1987.

Zlatoje Martinov, **Bibliografija književnih dela jugoslovenskih pisaca prevedenih na esperanto** (Bibliografio de beletraj verkoj de jugoslaviaj aŭtoroj tradukitaj en Esperanton). Temas nur pri librofomaj verkoj. Mostovi (Pontoj), Pljevlja (nun Montenegro), 148-149-150, 1997.

En Literatura Mondo, Vraca (Bulgario), n-ro 187, oktobro 2000, aperis la ĝis nun plej kompleta **bibliografio** kompilita de Boriša Milićević pri **Tibor Sekelj**.

En la Kolekto de DESKF, Banja Luka, 2003, aperis **Bibliografio de (serblingvaj) beletraj Esperanto-tradukoj, rilata al Respubliko Serba, BkH**. Kompilis Boriša Milićević (23-36 pp). La Sesa Sesio de DESKF, Banja Luka, 2003.

La Eldonejo Bero, Rotterdam aperigis en 2007 la libron **Bibliografie de traduceri din literatura Română în limba Esperanto** (Bibliografio de tradukaĵoj el la rumana literaturo en Esperanton. En ĝi estas ankaŭ bibliografiaĵoj pri tradukoj de poemoj de Vojvodinaj rumanlingvaj aŭtoroj.

Aŭtoro de ĉi tiu verko estas **Dimitrije Janičiĉ**, ĵurnalisto, esperantista verkisto kaj aktiva membro de beograda Esperanto-societo kaj membro de E-Instituto.

## INFORMADO EN EŬROPA UNIO (IOMETE PRI EŬROPA BULTENO)

En Strategia laborplano de UEA por informado oni diras: „Informado signifas atingi, ke la homoj, kiujn oni volas informi, havu kiel eble plej ĝustajn ideojn pri Esperanto. La agadkampo ankaŭ celas atenton al vasta kompreno pri la aspektoj de internacia komunikado en kaj ekster la Esperanto-movado. Konsciigo kaj klerigo de la Esperanto-movadoj estas esenca por sukcesa kaj vastskala konsciigo kaj klerigo ekster la movado. Sur la ekstera kampo, necesas celi ne nur al pasiva(n) informado(n) (nur al petantoj), sed plie al aktiva informado, ĉu al la publiko ĝenerala ĉu al pli faka publiko.“

Ĉu ni estas bone informitaj, kaj ĉu nia informado, aparte pro strategiaj planoj de nia lando – „estu membro de Europa Unio“ – kongruas kun Strategia plano de UEA kaj kun plano de Eŭropa Esperanta Unio? En Strategia plano de UEA ekzistas difinitaj celoj:

„Direkte al **tutmondiĝo** la agadkampo entenas atenton al tutmonda konsciigo kaj klerigo en regionoj kaj landoj kie la Esperanto-movado ne enradikiĝis aŭ estas malforta. Direkte al **plijuniĝo** la agadkampo entenas atenton al konsciigo kaj klerigo de junaj personoj en kaj ekster la Esperanto-movado. Direkte al **malfermiĝo** la agadkampo entenas atenton al komparado de niaj vid-punktoj kun tiuj de la neesperantista intelektularo kaj publiko. Direkte al **profesiigo** la agadkampo entenas atenton al plikvalitigo de la studado pri internacia komunikado kaj pri la rolo de Esperanto.“

Bedaŭrinde, nia plano estas simila al UEA. Al nia movado estas bezonataj plijuniĝo kaj denove plijuniĝo. Meza aĝo de nia membraro estas pli ol kvindek jaroj. Ni scias, ne promesas certan estontecon de movado.

Sed, tio ne estas temo de ĉi tiu teksto. Mi deziras tre mallonge prezenti al vi informadon en Europa Unio tra la mallonga analizo de Europa Bulteno, kvankam analizo ne pli profunde taksas tekstojn, sed donas informojn pri enhavo, pri aŭtoroj kaj pri temoj.

Redaktoro de E-Bulteno en la jaro 2009 estis Vesna Obradović. Ĉijare redaktoro estas Zlatko Tišljar. Diferencoj en redaktado ekzistas: Bultenoj en 2009 estis pli bele kaj virine atente preparitaj, kaj en kvar numeroj de ĉijara Bulteno estas vidita vira mano, seka, nur informoj, kio konvenas al „oficiala organo“.

En Bulteno tre malofte aperas informoj el aliaj landoj. Eble, la redakta komitato pravus, ĉar E-Bulteno estas Bulteno de landaj asocioj, landoj membroj de EU. Probable, ili finance subtenas la aktivecon de EEU. (Redaktoro diris al ni ke aperado de Bulteno estis financita de EŬ, sed ekde 2008 ne plu estas kaj ke ili ĉiam provis aldoni tekstojn de ekster EŬ, sed ili ne ĉiam ricevis bonajn tekstojn pri tio.

En dekdu numeroj de E-Bulteno en la jaro 2009 aperis 74 tekstoj. Multaj landoj, kvankam ili estas membroj de EU, ne havis tekstojn pri aktiveco de ilia E-organizo. Tekstojn verkis 32 aŭtoroj. La plej multajn tekstojn verkis Zlatko Tišljar, nuna redaktoro (18+kelkajn kun Maja Tišljar), redaktoro Vesna Obradović verkis dek tekstojn, se mi ne nombras mallongajn notojn de antaŭparolo sur la unua paĝo. Aliaj krom aktivuloj prezidanto de EEU s-ro Rajan kaj s-ro P. Balaž verkis po unu tekston.

Temoj prilaboritaj por Bulteno estas diversaj: dokumentoj de EU, Esperanto en membroj de EU kaj esperantistaj okazaĵoj, pli malgrande pri Esperanto en la mondo, estis prezentitaj kongresoj de esperantistoj en landoj membroj de EU, kelkaj tekstoj pri novaj libroj, pri Vikipedio kaj tagoj de lingvoj, nur kelkaj komentoj de okazaĵoj, du tekstoj pri Esperanto en lernejoj, unu poemo okaze de festotago, pri konservo de eŭropaj valoroj, pri kristanismo kaj islamo, ktp. Aperis tekstoj pri Hungario, Germanio, Danio, Italio, Estonio, Svedio, Nederlando, Slovenio kaj Polando. Interese estas ke pri Hungario kaj Polando ne aperis pli da tekstoj, kvankam ĉe ili okazas tre vigla esperantista vivo. Verŝajne, pro malbona kunlaboro. Pri UEA, ankaŭ, krom UK ne aperis tekstojn.

Bulteno ne aperigis malsamajn opiniojn, nek tekstojn el aliaj esperantaj gazetoj kaj aliaj kontinentoj. Ĉio komenciĝas kaj finiĝas en Europa unio. Bulteno ne estis sendita al Esperantaj organizoj, en ĝi tre malofte aperas tekstoj el aliaj landoj kiuj ne estas membroj de EU (unu teksto el Serbio aperis en Bulteno en la jaro 2008). Fine de pasintjaro Bulteno estas metita sur paĝaro [gazetejo.org](http://gazetejo.org) kaj regule metita en paĝaro EEŬ, ĉitie ĉiuj povas legi ĝin.

En Bulteno oni skribas pri aktivecoj de EEU (Eŭropa Esperanto Unio), AVE (Aktiva Eŭropa Civitaneco), EDE (Eŭropo Demokratio Esperanto), EACEA, AEC, pri verdaj partioj, pri Vikipedio, KAEST, ILEI (Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj) kaj IPR (Internacia Pedagogia Revuo), konservado de eŭropaj valoroj.

Mi elektis kelkajn temojn kiuj aperis en E-bulteno pasintjare kaj en la unua duono ĉijare. Unu el interesaj temoj estis iniciato de la slovena parlamentanino Ljudmila Novaki al komitato por kulturo kaj edukado kaj tiamaniere atentigis la parlamenton pri Esperanto (78). Ŝia propono aperigita en la teksto de Z. Tišljar en E-Bulteno estis jena: a) „...konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel „lingvo franca“ kaj ŝi b) „...proponas ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, respektante lingvan diversecon kaj stimolante lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo. c) „...konstatas ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efikojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus la uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.“

Interese estas ke s-ino Novak metis sian proponon en blogo kaj dum kvar semajnoj estis pli ol 5.000 voĉoj el kiuj 99% subtenis ŝiajn amendojn. Bedaŭrinde, krom reklamo por Esperanto, ĉio finis neordinare. Mi citas tekston de Z. Tišljar el Bulteno 79: „La tuta afero estas tre sus-

pektinda, sed ĝi montras ke efektive ekzistas klaraj direktivoj agi kontraŭ ĉiu serioza klopodo en kiu Esperanto ricevus iun ŝancon. Ne sciante efektive ĉu Esperanto reale povus havi subtenon, tiuj kiuj havas potencon (mi supozas iuj fortoj en eŭropaj organoj kiuj batalas por la venko de la angla) instrukciis la prezidantinnon tiel agi.“

Kompreneble, la oka kongreso de Eŭropa-Esperanto Unio meritas apartan atenton de Bulteno. Kongreso okazis samtempe kaj samurbe kun la 86-a kongreso de germanaj esperantistoj en Esperanto-urbo Harberg am Harz. Mi elektis unu el konkludoj de kongreso en kiu oni diras ke necesas kunlabori kun diversaj organizoj kaj eĉ politikaj partioj kiuj havas en sia programo lingvan demandon kaj aparte salutis partion EDE (Eŭropa Demokratio Esperanto). Programo de la kongreso povus esti interesa por organizi niajn kongresojn: prelegoj, fakaj temoj (tre riĉaj kun 41 temoj), kunsidoj (jarkunvenoj, landaj Ligoj, esperanto-instruistoj, kolektantoj), ekskursoj, kulturaj kaj distraj programeroj). Aparte estis menciita prelego de prezidanto de EEU, d-ro Sean O Riain, kiu substrekis tri demandojn: menci i interesajn lastatempajn lingvopolitikajn evoluojn en EU, preparoli kiel Esperanto povus pliefikigi la Eŭropan Union kaj kontribui al ties integriĝo kaj proponi konkretajn agadojn.

Apartan atenton en la Bulteno havas la tielnomata „eŭropa civitaneco“. En 86/7an numeron de Bulteno, Maja Tišljar deklaris ke: „temas pri la programo „Eŭropo por Civitanoj“, la baza temo ĉiam estas la aktiva eŭropa civitaneco. Ĉiuj organizoj kune provas ellabori la manieron eduki la civitanojn de EU ke ili komprenu sian ne nur nacian sed ankaŭ eŭropan civitanecon, la rajtojn kaj la devojn de eŭropaj civitanoj kaj la ideon de partoprendemokratio kiun celas EU. La malalta procentaĵo de la civitanoj kiuj voĉdonis dum la juniaj balotoj de la Eŭropa Parlamento estas grava montrilo pri multaj faktoj: manko de scioj pri EU, manko da intereso pri la politiko ene de EU kaj pluraj aliaj. La civitanaj organizoj kaj la „pensfabrikoj“ kunlaborantaj en la grupo faris plurajn kaj plurnivelajn analizojn pri la partopreno en la elektoj. Tiuj analizoj estas nun bazo por pli detalaj analizoj kaj por novaj strategioj kiel atingi la intereson de Eŭropanoj



pri EU ĉar politikistoj mem ne agas tiucele kaj eventuale interesiĝas pri la temo nur por esti elektitaj.“

Tio estas interesa por ni. Nin en socialismaj tempoj oni persvadadis pri „jugoslavia“ identeco kaj ni kun bedaŭro vidis kiel finiĝis tio. Nova, duobla identeco civitanoj de EU eblas esti interesa, eble kun esperanto, kvankam Z. Tišljar pri tio havas propran malsaman opinion (vidu lian intervjuon en *Libera folio*). Tamen, oni indas informi pri tio. Menciita estas tre mallonga informo pri partopreno de EEU en Universala Kongreso en Bjalistoko. Pri multlingvismo aperis pli da tekstoj, sed apartan atenton meritas civitansocia platformo por promocii multlingvismo (en ĝi inter slavaj landoj apud membroj de EŬ Ĉeĥio, Polando, Bulgario staras Kroatio, sed ne Serbio!) EEU kiel Bulteno informis en la 88/9 numero EEU fariĝis „membro de platformo de eŭroponivelaj civitanaj organizoj pri multlingveco kiel oficiala platformo por tiu temo de EU. En ĝi enestas trideko da eŭroponivelaj organizoj tre gravaj kaj la sekretariaton transprenis Eŭropa Asocio de Kulturinstitutoj. Temas pri grava agnosko al ni kiel serioza partnero kaj tiu interalie postulas nian kvalitan kunlaboron. Ĝi antaŭvidas du centrajn kunsidojn kaj kunlaboron en preparo de dokumentoj“.

En la plano de EEU por 2010, inter alie, estas konferenco je la temo „Eŭropaj valoroj“, partoprenado en konferencoj kaj simpozioj pri lingve ligitaj temoj, partopreni kiel partnera organizo en ekonomia forumo pri la kostoj de tradukado (ekonomia aspekto), organizi debat rondon en Eŭropa Parlamento kun temo *Esperanto – ĉu amiko aŭ malamiko de multlingveco*, kunlabori kun UEA; TEĴĴA; Asocio por eŭropa konscio, EDE, IKEL, FAIB, EBLUL, kaj aliaj organizoj je Eŭropa kaj internacia nivelo speciale tiuj kiuj membras en la Platformo pri multlingveco. Mi aparte salutas kunlaboron kun TEĴĴA (pri tio mi pli longe parolis dum kongreso de TEĴĴA, sed en la enhavo de E-Bulteno tio ne estas videbla. Se tion E-Bulteno ekfaros ĝi estos pli informa kaj pli interesa por ĉiuj. En la programo, bedaŭrinde, ne estas menciitaj landoj kiuj ankoraŭ ne estas membroj de EU. Al ili oni povus almenaŭ sendi Bultenon, kun ili havi kunlaboron. Probable, devas havi pli propra iniciato.

En la kvara numero (93) 2010 aperis teksto pri ILEI kaj pri IPR, interesa teksto pri laborgrupo ALIE (Antaŭenigi la lernejan Instruadon de Esperanto), pri seminario AIS (ĉijare en Bulgario), bela artikolo pri esperanta versio *Le Monde diplomatique*, teksto pri komuna eŭropa projekto „Tri eŭropaj infanaj libroj en Hindujo kaj unu hinda en Eŭropo“ en kiu sukcese partoprenis niajn najbarojn Slovenio kaj Kroatio.

\* \* \*

Do, tiel aspektas Eŭropa Bulteno. Lingva politiko de EEU diferenciĝas de politiko de UEA, ĉar UEA parolas pri neŭtraleco, sed ... la praktiko diferenciĝas. Bona analizo pri eblecoj de Esperanto kiel lingvo de Eŭropa unio donas al ni dubon de Esperanto kiel lingvo de Europa Unio. Pri tio tre interese skribis I. Earl en la libro dediĉita al Hemfri Tonkin. Tamen, kiu scias kion portas la estonteco?

Kion mi ne ŝatas en Eŭropa Bulteno?

Limoj de EU ne devas esti limoj de Bulteno. Membroj-laboristoj de EEU ne riskas esti la unikaj ĵurnalistoj! En Europa E-movado estas multaj temoj, kuriozaĵoj, okazaĵoj, iniciativoj kiuj devus esti montritaj kaj priskribitaj en la Bulteno. La lastaj numeroj (2010) informis pri retaj multaj ligiloj, kio estas tre bona.

Junigado de E-movado ne estas tasko, tio estas devigo. Ĉiuj iniciatoj por plijunigi E-movado devas havi la plej gravan lokon en aktivecoj de EEU kaj ĉiuj landaj asocioj. Se ĉiuj atendas iniciatojn el EEU kiu donas rimedojn por laboro metis ilin antaŭ malfacila, sed deviga tasko: helpi al ĉiuj plijunigi Esperanto-movadon. Ne nur inter membroj de Eŭropa Unio sed inter ĉiuj Esperanto organizaĵoj.

Mi opinias ke ĉi tiun demandon oni devas analizi diversmaniere. Ni devus komenci per taksado de la stato de la movado, kaj nur post tio taksi la estontecon de la movado. Ĉu nia movado tra la dekada (aŭ du dekadaj) estos nur unuiĝo de olduloj? En menciitaj kritiko kaj intervjuo oni ne trovas vortojn pri „farado“ (edukado, altirado de novaj, junaj membroj). Certe, la estonteco de nia movado ne estas en fermita rondo de amantoj el iamaj pasintaj tempoj, en kiuj frateco de popoloj (kaj en iamaj socialismaj landoj ĝi estis unika ligo kun alia „libera“ mondo) estis idealo

por kiu ŝtatoj donas financojn. Multaj hodiaŭ provas propagandi Esperanton en Zamenhofa maniero aŭ per metodoj el Lenintempa slogano ke „Esperanto estas latina lingvo de proletoj“. Tiuj sloganoj enhavas iom da vero, sed... hodiaŭ neniu komprenas tiajn parolojn. Ili sonas naive, sed en niaj jaroj kaj en jaroj de nia movado naiveco nomiĝas malsame stulteco... Nuntempe regas nur profito kaj intereso. Do, pro tio nia movado restas sen junaj membroj.

Se vi provas persvadi iun junan homon pri avantaĝoj kaj valoroj de Esperanto, almenaŭ kiam ni parolis al junaj homoj pri tio, la plej ofta ilia respondo estis – demando: „Bone, tio estas bela, sed kio ĉi tie estas mia utilo? De io mi devas vivi, ĉu ne?“ Junuloj, eble, pravas. Ĉu nia movado staras sur belaj idealoj kaj ne en realeco?

Kian respondon vi proponas al tiu demando? Ĉu ekzistas bona respondo?

Probable, respondoj estas pluraj, sed nenio estas konvinkiga. Tio altrudas du proponojn por nia laboro en movado.

Serba Esperanto-movado ne havas forton por grandaj provokoj, eĉ nek por pli bona organizo de instruado (kaj informado) de esperantistaro. Ni povus elekti dekojn da bonaj esperantistoj, ĉar multaj niaj esperantistoj scias nur bazan Esperanton, ne havas sperton por interparolado kaj kontaktoj, ne legas E-gazetojn, ne scipovas retumi, mal multe aŭ nenion scias pri komputiloj, unuvorte, nia E-movado estas malfora kaj nekapabla por fari novajn generaciojn de esperantistoj, kaj sen junaj esperantistoj ni ne havas estontecon. Tio ne estas neordinara, ĉar nia nuna prezidanto ne parolas Esperanton. Lin elektis homoj kiuj ankaŭ malbone, aŭ neniel parolas internacian lingvon. Nian gazeton, „Beograda Verda Stelo“ faras deko da entuziasmuloj kiuj provokas aliajn (50 abonantojn, 20 retaj ricevantoj kaj 20 de tempo al tempo legantoj), kaj se ili ne laborus, la revuo estingiĝos.

Miaopinie, la nuna momento en nia movado estas malbona kaj ĝia estonteco tute malcerta. Eble, nia alproksimiĝo al Europa Unio povas esti stimulo. Kaj tio dependas, inter alie, de bona informado kaj de loko de E-movado en Eŭropa Unio.



Dro **Miodrag Stojanović**, aŭtoro de ĉi tiu verko estas universitata profesoro de greka lingvo, aŭtoro de multaj sciencaj verkoj, ĉefredaktoro de Beograda Verda Stelo.

## INSTRUADO DE ESPERANTO EN NUNTEMPA EŬROPO – Teoriaj kaj didaktikaj vidpunktoj –

Lernado de la lingvo Esperanto kaj esperantiĝo devas esti daŭraj procezoj. La esperantiĝo ne finiĝas per la trapaso de baza kurso dum kiu oni ĝenerale lernas lingvajn karakterizojn kaj ne multe pri historio kaj movado tutmonda. Jam dum la komenca lernado estontaj esperantistoj devas kompreni ke la fenomeno Esperanto estas tutmonda. La tutmondiĝo de la lingvo Esperanto kunigas ĉiujn individuajn kaj sociajn kapablojn por disvastigo kaj uzado de tiu ĉi internacia lingvo je ĉiuj meridianoj de la mondo, precipe inter junuloj.

La ĝeneralaj kapabloj de lernantoj aŭ uzantoj de la lingvo konsistas ĉefe el scioj, lertoj kaj personecaj kapabloj, kaj krome el lernokapabloj. Ĉiu interhoma komunikado baziĝas sur komunaj scioj pri la mondo. En scienca kaj teknika edukado, lernejoj scioj klare ludas gravan rolon ĉe la ricevado kaj komprenado de fremdlingvaj fakaj tekstoj. Scioj pri komunaj valoroj kaj kredoj de sociaj grupoj en aliaj landoj kaj regionoj, kiel religiaj kredoj, tabuoj, komprenoj pri la komuna historio, estas esencaj por interkultura komunikado. Ĉi tiuj multkampaj scioj varias de homo al homo. Personecaj kapabloj povas esti konsiderataj kiel la sumo de individuaj ecoj; ĉi tiajn kapablojn oni ne konsideras kiel simplajn rezultojn de neŝanĝiĝemaj personaĵoj. Ili entenas faktorojn, kiuj estas rezulto de diversaj tipoj de kulturaj adaptiĝoj kaj estas modifeblaj. La personecaj trajtoj, sintenoj kaj temperamentoj estas parametroj, kiuj konsiderendas ĉe lernado kaj instruado de lingvoj. Tio, kiom personecaj kapabloj estas

akireblaj aŭ modifeblaj dum uzado kaj lernado, oni povas strebi al evoluigo de sintenoj. Lernokapabloj aktivigas personecajn kapablojn. Lernokapablojn oni povas koncepti ankaŭ kiel scipovo aŭ emo malkovri „aliecon“, ĉe kio ne gravas, ĉu temas pri alia lingvo, alia kulturo, alia popolo aŭ novaj sciokampoj.

Oni povas konsideri, ke komunikaj lingvaj kapabloj konsistas el diversaj elementoj: lingvaj, socilingvaj kaj pragmatikaj. Lingvaj kapabloj inkluzivas leksikajn, fonologiajn kaj sintaksajn sciojn. Socilingvaj kapabloj koncernas la socikulturajn cirkonstancojn de lingvouzo. Pragmatikaj kapabloj regas la funkciajn uzon de lingvaj rimedoj.

Pro tio „la resuma verko **Komuna Europa referenckadro por Lingvoj**: lernado, instruado, pritaksado celas en travidebla kaj kohera maniero subteni lingvolernantojn, lingvouzantojn kaj instruistojn ĉe la difinado kaj atingado de siaj celoj. La ellaboritaj taksosistemoj ebligas unuecan mezuradon de lingvaj kapabloj, kun travideblo kaj internacieco, kiu faciligos kompari lingvokononjn en diversaj landoj en Eŭropo, kaj eĉ ekster ĝi. Jes, eĉ ekster Eŭropo, ĉar la Komuna Eŭropa referenckadro fariĝis sekunda modelo ankaŭ alikontinente, en pluraj landoj de Azio kaj ŝtatoj en Usono. Ĝuste tio necesigis, ke ĝi estu tradukita al – kaj aplikata por – Esperanto. Tion oni povas tralegi en antaŭparolo de ĉi tiu verko, kiun eldonis UEA, Roterdam 2007.

Lingvosistemoj estas tre kompleksaj kaj neniu lingvouzanto povus jam ajn plene regi la tutan lingvon de vasta, diverseca, evoluinta socio. Tio ne eblas, ĉar ĉiu lingvo kontinue evoluas responde al dumuzaj komunikaj bezonoj. Por prezenti la lingvon por instruaj celoj, oni ankoraŭ nun uzas la saman metodon por la jam delonge mortintaj klasikaj lingvoj kvankam tiu ĉi 'tradicia' modelo estis jam antaŭ pli ol cent jaroj malakceptita de la plej multaj profesiaj lingvistoj. Krome, la tradicia modelo estis ellaborita por limigita tipo de lingvoj, kaj ne taŭgas por priskribi lingvosistemojn kun tute alia strukturo. Freŝdataj studoj pri lingvaj universalaĵoj ankoraŭ ne produktis rezultojn, kiuj estus rekte uzeblaj por la lernado kaj instruado

de kотибиngvoj. Lingvaj kapabloj estas difinitaj kiel konoj pri la formalaj rimedoj, per kiuj oni povas kompili kaj formuli bone strukturitajn, signifohavajn mesaĝojn, kaj la kapablon uzi tiujn rimedojn.

Necesendas pro tio plijunigi niajn rondojn kaj ebligi la instruadon pri Esperanto al personoj kiuj povas utiligi siajn konojn de la fenomeno Esperanto en sia profesia vivo. Instruistoj trejniĝu pri komunikiga kaj aktiva pedagogioj, traktante precipe la specifajojn de E-instruado kaj la lokojn de naciaj kulturo, tradicio kaj historio en lingvo komunumo. La lernantoj tiam estu pretigitaj por posta memstara agado. Nome, klasikaj niveloj: elementa, meza kaj supera, estas pluidevitaj – baznivela lingvouzanto, memstara lingvouzanto kaj profesinivela lingvouzanto.

Por ke Esperanto estu instruata je oficiala nivelo en la lernejoj de la unuopaj landoj estas nepre kunlabori kun UEA kaj ILEI, ankaŭ kun aliaj instancoj koncerne la programon de instruista trejnado. La estraro de UEA, kunlabore kun ILEI, akcelas la produktadon de lerniloj por la landoj/lingvoj, kie ili mankas. Ekzemple, UEA postularo de la ekzamenoj starigas: a) edukajn celojn, nome – interkompreniĝo kaj kultura interŝanĝo kaj b) instruajn celojn kiel – kapablon uzi la lingvon, tio signifas – kompreni, paroli kaj skribi produktive.

UEA kaj ILEI starigas programon de instruista trejnado, kiel esencan elementon de la starigata komuna ekzamena branĉo „Instrukapablo“, klopodante enkadrigi elementojn de tiu trejnado en la strukturojn de oficialaj edukaj instancoj kaj helpi al provoj konstantigi aŭ malfermi oficialajn universitatajn kursojn. Jen la landoj en kies univesitatoj la lernado de Esperanto atingis konsiderindan sukceson: Ĉinio 15 univesitatoj, Brazilo (5), Japanujo, Pollando kaj Ruslando (4), Germanio, Ameriko kaj Koreo (3), Litovio kaj Venecuelo (2), kaj kelkaj po unu univesitato (Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Italio, Hispanio, Kenio, Kostariko, Meksiko, Holandio, Slovenio kaj Svedio).

Por la diskonigo de la Esperanto-kulturo en neesperantistaj medioj, UEA subtenas la eldonadon de nacilingvaj tradukoj de la originala Es-

peranto-literaturo. Utiligon de Esperanto en scineco UEA subtenas ĉefe per verkado pri sciencaj temoj.

La ĉefa celo de ILEI estas helpi al instruistoj, kiuj volas disvastigi tra la lernejoj de la mondo la lernadon kaj uzadon de la lingvo eseperanto, kiel bazo kaj modelo de nova komunika ordo, kie ĉiuj homaj kulturoj havu principe egalajn ŝancojn esprimi sin. Iu el la bazaj celoj de ILEI estas helpi al la esperanto-lernejoj, t.e. al la lernejoj (inkluzive universitatojn), kie okazas io per aŭ pri la lingvo esperanto. Tipa helpo estas faciligi la kontaktojn inter tiaj lernejoj, por kunlaborado, eĉ en specifaj plurlandaj projektoj. Grave menciindas la komunikkanaloj por ILEI (Internacia pedagogia revuo), krom aliaj nterretaj kaj paperaj komunikiloj.

La ILEI membroj povas renkontiĝi en konferencoj, kiuj okazas ĉiun jaron en alia lando, kaj en sciencaj simpozioj, kiuj alfrontas apartajn problemojn; krome ili partoprenas apartajn kunsidojn, kiujn gastigas la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Estas interesaj komputil-retaj kursoj kaj ĝiaj kontribuoj al la lernado kaj paroligo de la lingvo; al la lernado jes sed ĉu kaj kiom da al paroligo? Perreta instruado imagas instruiston kiu prezentas kiel eble plej riĉan lingvan medion kiun lernanto povu eniri kaj sperti sen formala instruado. Nome, mi opinas ke retaj kursoj kontribuas pli al plibonigo de jam atingitaj niveloj de la lingvokono, malpli al paroligo.

Diskonigo de la E-kulturo per tradukoj en ne esperantistaj medioj estas ege valora kaj pri tio oni devas nepre zorgi.

La utiligo de Esperanto en scienco, ĉefe per verkado pri sciencaj temoj, estas ege grava vidpunkto, kaj teorie kaj praktike.

Sciencaj kaj teknikaj artikoloj en Esperanto abundas en la interreto; la esperanta vikipedio kreskas rapide...

\* \* \*

Sendube necesendas persiste daŭrigi la lernadon kaj instruadon de Esperanto-lingvo anstataŭ zorgi pri nuntempaj rekomendoj de tiel nomata



---

globiŝ, la termino kiun forĝis antaŭ 15 jaroj unu franca lingvisto-amatoro. Temas pri angla kiu ne estas lingvo sed rimedo de komunikado en nuntempa mondo. Pri tiu lingvo la brita ĵurnalista Roberto Mekram skribis la libron titolitan Globiŝ: kiamaniere la angla fariĝos tutmonda lingvo. La aŭtoro antaŭvidas ke globiŝ – angla fariĝos la rimedo de komunikado en la tria miljaro. Do, ne temas pri la lingvo, ĉar vera lingvo estas portanto de konkreta kulturo. Ekzistas opinio por ke ĝi limigos la influon de anglaj lingvo kaj kulturo. Jen, la plej nova diskutebla kaj diskutinda tutmonda lingva rimedo.

Pro tio oni devas scii ke „lingvo estas ne nur grava aspekto de kulturo, sed ankaŭ rimedo por aliri kulturajn manifestiĝojn“?

Aŭtoro de ĉi tiu verko estas magistro **Zlatoje Martinov**, verkisto, literatura kritikisto, ĵurnalisto (redaktoro en gazeto „Republika“), tradukisto, aŭtoro de kelkaj libroj kaj multnombraj esperantistaj verkoj, membro de Esperanto-PEN, de beograda Esperanto-societo kaj Esperanto instituto.

## LA EŬROPA HEREDAĴO DE LA ESPERANTA LITERATURO

La historio de supernacia literaturo nur devus esti verkota. La esperanta jam havas adekvatajn ecojn por vere tio esti. Fakte, dum lastaj jardekoj ĝi reale ĉiam pli iĝas tio. Tamen, laŭ siaj multaj ecoj, ĝi estas *eŭropa*, t.e. ĝi ĉerpas siajn plej gravajn elementojn el la eŭropa literatura heredaĵo. Tio estas tute komprenebla, ĉar ekestinte sur la eŭropa tero ĝi kundividas la destinon de la literaturoj en la tiea granda lingvo-zono.

Interne de tiu enorma zono ekzistas dividoj kiuj koncernas la lingvajn limojn. Ekzistas, nome, grupoj de tri ĉefaj lingvo-familioj de Eŭropo, kiuj prezentas puran esencon de Zamenhofa projekto de la internacia lingvo kaj same la esencon de la esperanto-literaturo: la slava, la romana kaj la germana. Ĉi tiuj lingvaj kaj literaturaj familioj forte influis – ĉiu en diversaj gradoj kompreneble – la esperantan literaturon. Tute logike unue dominis la slava skolo surfrunte de Zamenhof, Grabovski,. Devjatin kaj aliuloj kiuj devenis el la slava medio, poste superregis la franca skolo kiel reprezentatno de la romana lingvo- kaj literaturfamilioj kiun gvidis fama esperantologo, verkisto, tradukisto kaj dramisto Edmon Priva, apartenanta al la franca lingva kaj kultura zono en Svislando.

Historio de la temoj, formoj, metaforoj kaj ĝenroj en la esperanta literaturo same estas tipe eŭropa. Ĝi same samkiel en la eŭropaj naciaj literaturoj devenas de la antikvaj literaturoj grekaj kaj romaj,

sed modifitaj kaj filtritaj tra ilia mezepoka kaj renesanca evoluoj ĝis la hodiaŭaj tagoj. La eŭropa estas eĉ metriko kvankam ĝi estas direkte ligita al ekzisto de la diversaj lingvaj sistemoj.

La grandaj literaturaj movadoj kaj stiloj de moderna Eŭropo kiel ekzemple renesanco, baroko, novklasicismo, romantismo, realismo, simbolismo, modernismo, estas puraj historiaj trezoroj de kie la esperanta literaturo ĉerpis siajn modelojn. Ĝi -kvankam nur 120 jaraĝa, - havis la unikan eblecon en sin enkorpi la diversecojn de la stiloj kaj direktoj de la eŭropaj naciaj literaturoj. Sed ilia geografia disvastigiteco estis malegala: ekzemple renesanc-ondo el Italio kaj apudmaraj landoj atingis eĉ Pollandon sed entute ne tuŝis Serbion kaj Ruslandon; la baroka stilo traondis tutan okcidentan Eŭropon inkluzive la landoj de la hodiaŭa politika oriento eŭropa, kiel ekzemple estas Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Kroatio, Slovenio kaj nuntempa serba aŭtonoma provinco Vojvodino.

Interesa estas ankaŭ la tempo-dispaŝo koncerne la daŭron de tiuj literaturaj stiloj: baroko ekzemple daŭris en sudaj partoj de Aŭstrio (Slovenio, Kroatio, Vojvodino) ĝis la fino de la XVIII jarcento, kiam en la eŭropa okcidento jam finiĝis epoko de racionalismo. Sed ĉe ni, Dositej, la granda entuziasmulo pri la eŭropa racionalismo, tiutempe nur forte klopodis fundamentigi la popolan klerigitecon kontraŭ la konservativaj kristanismaj dogmoj.

Pro la komuna historio de la ideoj, la eŭropaj literaturoj spite al lingvaj diferencoj, formis la samajn artajn kaj literaturajn stilojn, skolojn kaj ĝenrojn, kompreneble respektante certajn specifaĵojn. Tio validas ankaŭ por la esperanta literaturo.

Kiam temas pri la literaturaj ĝenroj, ili en la esperanta literaturo havas pure la eŭropajn radikojn: en plej ĝenerala klasifiko elstaris tri fundamentaj literaturaj ĝenroj – lirika, epika kaj drama. Ĝermano de ĉi tiu klasifiko oni trovas eĉ ĉe Platono, fakte en lia tria libro

titolita kiel *Ŝtato*, kie li verkas pri diversaj specoj de poezio. Neniam ni forgesu ke la poezion dum longa periodo en la antikvaj tempoj, oni opiniis la ununura speco de la literatura kreado. La epika poezio por Platono estis fakte reciproka rakontado kaj imitado kiel ekzemple en *Iliado kaj Odiseo*, la lirika signifis la personan kaj profunde intiman rakontadon de la poeto, kaj la drama ĝenro (komedio kaj tragedio) por Platono estis nur imitado, ĉar ĉi tie oni ne trovas la direktan poetan vorton, la nura portanto de la drama fabulo estas dialogoj de la ĉefherooj. Nur en poetikoj de la XVII kaj XVIII jarcentoj, el tiuj ĉi tri fundamentaj ĝenroj elstaris ankoraŭ multaj aliaj, sed ankaŭ ili estas facile rekoneblaj je la tri antikvaj. Same la esperanta literaturo, laŭ la eŭropaj kriterioj, enkorpiĝos en sin poezion, prozon kaj dramon, kaj interne de ili ankoraŭ multajn subĝenrojn.

La tema kaj ĝenra evoluoj de la esperanta literaturo la plej esprimebla estis dum la superrego de t.n. budapeŝta skolo. La evolua kurado de poezio kaj prozo inkluzive de unu flanko rakontojn kaj novelojn, kaj romanojn de la dua, estis tre intensa. Tio estas rezulto ne nur de la aŭtohtoneco de la esperantaj aŭtoroj kaj de ilia matureco, sed antaŭ ĉio de tre signifoplenaj ŝanĝoj en la socia kaj kultura strukturo de la eŭropa socio post la Unua mondmilito. Nome, la revoluciaj movadoj kaj ideoj ligitaj al eksplodoj de la socia malkontentiĝo, precipe en Ruslando, Germanio, Hungario kaj alie, same la granda evoluo kaj populareco de la laborista movado kaj ĝia disvastigado tra la eŭropaj landoj, ĉesigis jam tradiciaj glorigon kaj idealigon de la lingvo esperanto kaj de la esperanta movado ekde la naskiĝo de Esperanto kaj dum la daŭro de la Unua periodo (1887-1918). Laŭteme oni direktiĝas de strikte esperanto-ideaj emocioj al la socia sfero. Tiamaniere estas plenigita ĝis tiam entute neesplorita kampo sur kiu elkreskis nova literatura direkto – direkto de la socia literaturo kies la plej elstara reprezentanto estis Imre

Baranji - EMBA. Kompreneble, tiu ĉi tendenco ne estis pleje superregata, sed dum la tridekaj jaroj de la XX jarcento ĝi komencis jam havi pli profundajn radikojn.

Paralele, komenciĝas la literatura esplorado de la internaj flankoj de l' homa personeco, enmerĝo en ties intiman mondon kaj tiuj ĉi faroj postulis iaspecan psikologion kaj necesan gradon de introspekcio.

Tiamaniere la esperanta literaturo riĉiĝis per evoluo de la psikologia literatura plano, ĝis tiam neglektita kaj praktike ne uzita kiel literatura medio. Enkondukon de la psikologia plano en la esperantan literaturon oni devas atribui ankaŭ al la eŭropa influo. Analizo de tn. mikromondo, do, fakte de la individuo, forigis la kronologian kaj faktografian, analitikan kaj logikan priskribojn de la evento.

Tamen tio pri kio ni parolas estis nur ĝermoj. Pli seriozaj trendoj anoncos sin nur dum la Tria periodo enkadre de la skota skolo (Viljem Old, Džon Dinvudi, Reto Roseti i Džon Frensis). Romano pli kaj pli forcedas sian lokon al rakonto, dramo ankoraŭ estas interesa ĝenro al kiu la esperantaj verkistoj dediĉas plenan atenton.

La esperanta poezio definitive fondita de unu flanko per la brila verstekniko de Kaloĉaj, kaj per majstra pensmaniero kun universaj refleksoj kaj per sugestema esprimiveco de V. Old de la alia flanko, tamen daŭras kaj konstante vivas kaj evoluas laŭ la propraj leĝoprocesoj: ĝi tute normale ŝanĝiĝas kaj evoluas danke al la influoj de la eŭropaj naciaj literaturoj. Poezio estas ĝenro kiu altnivele kontentigas la estetikajn kaj stilajn postulojn. Finfine, samkiel la aliaj naciaj eŭropaj literaturoj, ankaŭ la esperanta naskiĝis per poezio, fakte per du Zamenhofaj poemoj originalaj (*Ho, mia kor'* kaj *Mia penso*). Dank' al la du poemoj oni persvadis tiujn kiuj ne kredis ke Esperanto estas potenta ankaŭ kiel literatura lingvo. Ni

konstatu: poezio de la Unua periodo kiun Viljem Old nomis primitiva romantismo, tute klare respeguligas sian epokon. La budapeŝta skolo kiu kovras la tutan Duan periodon fakte kaj senrevene modelis la esperantan literaturon kaj pere de versbeleco kaj stilrafino alproskimigis ĝin al la vere eŭropaj literaturoj. La tria periodo, siaflanke, pleje kontribuis al la evoluo de la *poeta lingvo*.

Periodo de lastaj tridek jaroj montras ke la homoj kaj la mondo tre multe ŝanĝiĝis, same la esperanta literaturo. Dum tiu ĉi periodo la ĝenroj estas disvastigitaj sekvante – kun ioma distanco – la ĝeneralajn sociajn, ekonomiajn, politikajn, kulturajn kaj literaturajn ŝanĝojn kaj metamorfozojn. Eŭropo ĉesis esti kriterio de la literatura evoluo: la usona influo estiĝis pli grava. Kvankam la fabulo de la literatura verko ne estas tute detruita, ĝi ne plu tiel gravas kiel antaŭe: pli gravaj estas iaj aliaj teknikoj transprenitaj el la postmodernaj naciaj literaturoj de Eŭropo kaj Usono. Nuntempe venis periodo en kiu la eŭropaj radikoj iĝas ĉiam pli malsignifaj kompare kun la usonaj. La modernaj esperantaj literaturistoj esprimiĝas pere de elementoj de postmodernismo. Tiuj elementoj simple estas la ruinigo de fabulo kaj la kreado de meta-rakonto (rakonton en rakonto); en la esperanta poezio oni renkontas la similan proceson ne nur forme kaj stile sed ankaŭ teme.

La nova atendo-horizonto de la esperantista legantaro fariĝis, kiel neniam antaŭe, proksima al la kreiva estetiko de la aŭtoroj. Tio estas eksplikebla per pli granda teknologia progreso sur la kampo de komunikoj kaj informado kaj per globaligo de la ideoj. La esperanta literaturo, ne negante siajn eŭropajn radikojn, ĉiam pli kaj pli iĝas universala, vere monda. Dum la XXI-a jarcento en kiun ni ekpaŝis, tia trendo estos pli rimarkebla.

**Nedeljka Ložajić**, profesie psikologistino, esperantistino de 1971, aktivulo en movado de blindaj esperantistoj, aŭtoro pli da libroj kaj fakaj artikoloj, gvidis E-kursojn, estis prezidantino de LIBE, organizanto monda kongreso de blindaj esperantistoj.

## ROLO DE ESPERANTO EN KUNLABORO DE LA NEVIDANTOJ EN EŬROPO

En ĉi tiu referaĵo mi prezentas la plej gravajn punktojn en la agado de la nevidantoj en Eŭropo ekde la jaro 1904, kiam aperis la unua E-gazeto en Esperanto „Esperanta Ligilo“. Elstara germana blinda Esperantisto, Fritz Karow, diris, ke blindaj Esperantistoj inter la Unua kaj la Dua mondmilitoj, estis salo en la supo de la blinduloj. Gravan rolon en tio havis Brajla revuo en Esperanto “Esperanta ligilo”, precipe dank’ al fakaj kaj organizaj kapabloj de la homoj kiuj fondis kaj disvolvigis la revuon: Teophil Cart, Harald Thilander, Raymond Gonin kaj aliaj.

La revuo regule aperas ĝis nun kiel organo de Ligo internacia de blindaj E-istoj. Indas menci, ke ĝi aperis eĉ tri jarojn pli frue ol la organo de UEA, „Esperanto“.

La enhavo de la gazeto ĉiam estis tre interesa. En ĝi estas publikigitaj aktualaj artikoloj el tifologio, populara sciencoliteraturo, ŝakproblemoj, novaĵoj el la movado de la nevidantoj, enigmoj, rubrikoj: „Ni helpu unu la alian“ kaj „Mi deziras korespondi“. Ofte aperis, ankaŭ reliefaj aldonaĵoj kiujn ne superis eĉ nuntempaj preŝaĵoj. Ekzemple, aldonaĵo „Nia mondo“, en kiu reliefe estis prezentitaj flagoj de ĉiuj mondŝtatoj. Artikolojn el la revuoj oni tradukis nacilingven kaj el la naciaj gazetoj tradukis en Esperanton plej interesajn tekstojn por aperigi en „Esperanta Ligilo“. Ĝi ebligis facilan kontakton kaj interŝanĝon de spertoj inter la viddifektitoj.

Tial ne estas strange, ke pluraj estroj de specialaj lernejoj por blinduloj kaj la blindulorganizoj, klopodis enkonduki Esperanton kiel studobjekton aŭ organizi E-kursojn kadre de la societoj. Gravan rolon en la klerigo de la blinduloj en Blindul-Instituto en Zemun, kie la estro estis Veljko Ramadanoviĉ, havis instruado de Esperanto.

Ankaŭ en Bll.-lernejo en Zagreb kaj pluraj aliaj bli.-lernejoj en Eŭropo oni instruas Esperanton. Jam en la jaro 1921. oni organizas la unuan Kongreson de blindaj Esperantistoj kaj naciaj blindul-organizoj finance helpas la partoprenon de siaj membroj. Dum la Kongresoj oni traktas diversajn temojn: klerigo de la blinduloj, novaj helpiloj, enlaborigo, novaj profesioj, memstara moviĝo, unuigo de la Brajla sistemo, literaturo, prezento de nacia kulturo. Utilecon de la Kongresoj en plibonigo de la kvalito de la vivo de la nevidantoj pruvas regula organizado de la kongresoj. Partopreno en ili estas unika ebleco ekkoni aliajn landojn, senpere komunikadi kun samsortanoj el pluraj landoj, trovi geamikojn, interŝanĝi spertojn kun kolegoj, kunlaborantoj kaj tio instigas viddifektitojn lerni Esperanton kaj perfektigi la scion de la lingvo.

Jam en la jaro 1923. estis fondita UABE (Universala Asocio de blindaj Esperantistoj) kiu en la jaro 1931. transformiĝis al UABO (Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj).

En la nuna tempo la klerigsistemo kaj ĝenerala tendenco pri integriĝo de la vidhandikapitoj ŝanĝas la vivon de la nevidantoj. Same, la lernado de Esperanto kaj uzado de la lingvo efektiviĝas iom alie.

Krom la kursoj kadre de specialaj lernejoj, oni lernas Esperanton en la kursoj kune kun la vidantoj. Avantaĝon kiun donas novaj teknologioj: informado, komunikado kaj lernado pere de la reto donas al la nevidantoj pli da ebleco rapide lerni kaj informiĝi. Pluraj retpaĝaroj kaj elektronikaj libroj kaj revuoj en Esperanto forigas ofte barojn inter la vidantoj kaj la nevidantoj. Voĉsinteziloj kaj Brajlaj linioj donas eblecon memstare uzi la reton. Tamen, senpera informado de la membroj pri Esperanto kaj rektaj kursoj mankas.



Aperas nemalmultaj revuoj en Brajlo, kompaktdisko kaj en elektronika formo, ligantaj geesperantistojn en la tuta mondo. Krom la organo de LIBE, aperas „La kontakto“ en Nederlando, „La blinda Esperantisto“ en Germanio, „Esperanta fajrero“ (Bulgario), „Itala ligilo“, „Viburno“ (Ukrainio), „Aŭroro“. Dum la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento, en Serbio aperis aldono al la organo de la Blindul-Asocio de Serbio, „Sunapero“ en Brajlo. Pro financaj kaŭzoj ĝi ne plu aperas.

En CD oni povas ricevi la organon de UEA, „Esperanto-n“, revuon „Monato“, „Tempo“ kaj plurajn aliajn. Elektronike, tamen, multe pli kaj pli rapide, oni povas legi.

Aktualajn informojn pri gazetoj, Kongresoj, delegita reto, aliĝo al retkonferenco, adreso en la Adresaro, pri E-ekzamenoj ktp., oni ĉiam povas trovi en la paĝaro de LIBE: <http://libe.narzan.com>

Ekde la jaro 1921. ĝis nun estis organizitaj 75 internaciaj kongresoj de blindaj Esperantistoj, ĉiuj en Eŭropo (en 1973. kaj 2004. en Beograd).

Ligo internacia de blindaj E-istoj (LIBE) estis fondita en la jaro 1951. kaj nun ĝi havas membrojn en 37 landoj.

LIBE kaj la landaj organizoj de blindaj E-istoj aŭ Bll.asocioj, eldonis plurajn librojn en Brajlo, sonlibrojn kaj aliajn publikaĵojn en Esperanto kiuj estis kaj estas kultura ponto inter la nevidantoj. Ĝi helpas ekkonon de aliaj kulturoj kaj pensmanieroj de la homoj, apartenantaj al ealiaj popoloj.

Esperanto havis kaj havas gravan rolon en la integriĝo de la nevidantoj kaj ili nun aktive partoprenas en la ĝenerala E-movado.

Esperanto helpas kaj, ankoraŭ pli povas helpi proksimigon kaj reciprocigon de la kulturoj, unue de la najbaraj popoloj, en regiona kunlaboro kaj ankaŭ en la tutmonda kunlaboro.

Modelo de Eŭropo montras, ke Esperanto, precipe en terglobigo ĝenerala en ĉiuj kampoj de la homa agado, povas havi tre gravan rolon.



**Mag Radojica Petrović**, esperantista pedagogo, aŭtoro de fakaj kaj beletraj verkoj originale kaj traduke, eksa prezidanto de ILEI, JEL kaj SEL, nuna estrano de ILEI kaj membro de Esperanto Instituto

## LA STRATEGIA LABORPLANO DE UEA 2011 - 2020 KAJ E-AGADO EN EUROPO KAJ EN SERBIO

### Enkonduko

La Esperanto-agado hodiaŭ evoluas sub rapide ŝanĝiĝantaj soci-politikaj, ekonomiaj kaj teknologiaj cirkonstancoj en la mondo draste malsama ol ĝi estis en la unuaj jardekoj de la vivo de Esperanto. Sed la baza celo de Esperanto-movado restis la sama: reciproka kompreno kaj paca kunvivado en pli justa. Tamen la maniero por atingi la celon devas adaptiĝi kaj adaptiĝadi al la ŝanĝitaj kaj ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. La minaco de unulingva kaj unukultura hegemonio kontraste al la internacie proklamita kaj laŭdeklare subtenata protektado de kultura kaj lingva diverseco en la epoko de tutmondiĝo kaj informadika revolucio starigas antaŭ Esperanto kaj esperantistoj novajn defiojn kaj riskojn, novajn ŝancojn kaj obstaklojn. La Esperanto-komunumo, aŭ almenaŭ ĝia elstara parto, esprimis per la *Praga Manifesto* (1996, [http://www.uea.org/informado/pragm/pm\\_eo.html](http://www.uea.org/informado/pragm/pm_eo.html)) sian respondon al tiuj defioj kaj al aktualaj bezonoj de la homaro en la sfero de kultura diverseco kaj multlingva komunikado.

La preparata strategia laborplano de UEA, aprobat de la Komitato de UEA dum la UK en Havano, julion 2010, estas dokumento kreata kun ambicio apogi esperantistajn agadcelojn per intencoj plenumindaj dum la venonta jardeko 2011 – 2020. Ĝia titolslogano – *Konsciigo pri lingvoj kaj komunumoj* – ŝajne celas sin-tezi la tutan idearon de la *Praga manifesto* kaj motivigi strategiajn agadcelojn por la sekvontaj 10 jaroj. Kerna estas disvastigado de la konscio pri valoroj de Esperanto kaj amasigado de ĝiaj lernado kaj uzado en interkulturaj kaj interlingvaj rilatoj. UEA aparte klopodos konigi en la etnaj lingvoj la avangardajn kontribuojn, per kiuj la Esperantaj lingvo, movado kaj kulturo helpis plifortigi la

lingvojn kaj komunumojn, kreante pontajn rilatojn inter diversaj homaj lingvoj kaj kulturoj kaj fortigante etoson de reciproka akceptemo.

El pli praktika vidpunkto, la plano baziĝos sur du organizaj ebenoj:

- *la centra UEA* (baza arkitekturo) kaj
- *la pli larĝa UEA* (landaj kaj fakaj asocioj kaj aliaj agantoj je loka nivelo). kaj tri agadkampoj sur ambaŭ ebenoj:
- *prilingva kaj pri-Esperanta klerigado*, kiu celas unuavice la eksteresperantistan publikon
- *en-Esperanta klerigado*, kiu temas pri la kreado kaj diskonigado de klerigaj materialoj en Esperanto kun la celo pliefikigi la agadon sur la unua laborkampo kaj kultivi la Esperantajn lingvon kaj kulturon mem
- *organiza fleksebliĝo*.

La esperantistaj organizaĵoj en Eŭropo kaj ĉiuj ĝiaj landoj en kaj ekster la Eŭropa Unio, do ankaŭ en Serbio, trovas siajn lokon, rolon kaj ŝancojn sur ĉiuj tri agadkapoj enkadre de la tutmonda Esperanto-movado kun specifa adaptiĝo al la regionaj, landaj kaj lokaj cirkonstancoj. La celo de ĉi tiu artikolo estas diskuti kaj diskutigi pri la aktuala stato kaj strategie celinda evoluo de por-Esperanto kaj per-Esperanta agado ĝenerale, specife en Eŭropo kaj pli specife en Serbio.

## Celoj

Enkonduke en la planon UEA asertas siajn organizajn kaj agadajn celojn:

- grupigi la uzantojn de Esperanto kiuj kunlaboras por ties progresigo en la vasta kadro de agado por pli justa mondo,
- kontribui al pli vasta konscio pri la valoro de la neŭtrala lingvo Esperanto, kaj al pli amasa lernado kaj uzado de Esperanto en interkulturaj kaj interlingvaj rilatoj,
- evoluigi idean kaj organizan kadron, en kiu ĝiaj anoj povas senpere kaj efike kontaktiĝi kaj kunlabori, sen limigoj rilate al etna, nacia, seksa aŭ ekonomia identeco, politikaj aŭ religiaj kredoj.

Fone, UEA emfazas respekton al la homaj rajtoj, al neperforta, paca kunvivado kaj al la vivo-diverseco ĝenerale. Labore, UEA celas liveri tiujn servojn, kiuj helpas al ĝiaj anoj orientiĝi kaj engaĝiĝi en la kulturon kaj en la internacian komunikado-fluon, kiuj okazadas pere de Esperanto.

## Organiza fono

La proponata organiza skemo kun du strukturaj ebenoj – *la centra UEA* kiel organiza kerno, kaj *la pli larĝa UEA* (la vasta agnataro) kiel baza agadresurso – servas kiel apogilo por plani specifajn agadinitiajn sur ambaŭ niveloj.

Sur la unua ebena – *la centra UEA* – la plano vidigas jenajn organizerojn:

la baza arkitekturo de UEA (Komitato, Estraro, Centra Oficejo, en kerna partnereco kun TEJO kaj ILEI), la institucioj CED (Centro por Esplorado kaj Dokumentado) kaj Biblioteko Hodler, partnereco kun aliaj movadaj institucioj, ĉu jam tradiciaj (ekz. kun la Akademio de Esperanto), ĉu perspektivaj (ekz. kun la Esperanta Stud-Fondaĵo – ESF, kiu jam financis plurajn gravajn E-projektojn, sed ankoraŭ ne partnere kun UEA), diversaj komisionoj kaj komisiitoj, inkluzive tiujn la laboro en la kadro de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

Sur la dua ebena – *la pli larĝa UEA* – la plano listigas strukturojn kaj agadojn diversnivelaajn, de fakaj kaj regionaj ĝis lokaj kaj individuaj: fakaj asocioj aliĝintaj al UEA (ekz. ILEI, E@I, LIBE, IFEF, TEĴA, IKUE, ISAE k.c.), landaj asocioj de UEA, regionaj komisionoj de UEA (Azia – KAEM, Amerika, Afrika k.c.), la delegita reto (ĉefdelegitoj, delegitoj kaj fakdelegitoj), landaj asocioj, lokaj grupoj, societoj aŭ kluboj, unuopaj membroj kaj individuaj agantoj, kunlaborprojektoj kaj laŭinteresaj regrupoj kaj retejoj (*edukado.net*, *lernu.net*, *Interkulturo*, *Lingvo de paco*, *Indiĝenaj popoloj* k.s.).

## Agadkampoj

La agado estas planata en tri agadkampoj kun konkretaj aktivaĵoj sur ambaŭ organizaj ebenaĵoj. Por ĉiuj tri agadkampoj – *prilingva kaj pri-Esperanta klerigado*, *en-Esperanta klerigado* kaj *organiza fleksebligo* – estas planataj

La **unua agadkampo** – *prilingva kaj pri-Esperanta klerigado* – koncentriĝas al informado en etnaj lingvoj celita unuavice al eksteresperantista publiko. Ĝi signifas daŭrigon de la tradicia diskonigado de la lingvo Esperanto kaj de la atingoj de la movado kun aldona emfazo, ke esperantistoj delonge kontribudis al la diskonigado de la lingvoj kaj komunumoj kiel konservindaj valoroj, kaj al fortigado de bonaj rilatoj inter la komunumoj.

En la **dua agadkampo** – *en-Esperanta klerigado* – la plano antaŭvidas:

- kreadon kaj diskonigadon de klerigaj materialoj en Esperanto;
- pretigadon de movadaj agantoj por pli efike agi sur la unua laborkampo
- kultivadon de la Esperantaj lingvo kaj kulturo mem
- kunordigadon de la laŭlanda laboro farata sur ĉiuj laborkampoj

La **tria agadkampo** – *organiza fleksebligo* – signifas klopodon de UEA trovi adekvatan respondon al draste ŝanĝitaj agadcirkonstancoj, adapti sin al ili kaj certigi sian daŭropovan ekziston. Dum kelkaj lastaj jaroj UEA suferas faladon de membronumero kaj kotiza enspezo, ankoraŭ ne tre rapidan, tamen daŭran kaj malagrablan. Estas necesa ŝanĝo de la organiza strategio kiu baziĝas ĉefe sur la kotizpaganta membraro al organiziĝo laŭ celoj, metodoj, rimedoj kaj homoj. En la Komitato kaj aliaj strukturoj de UEA ankoraŭ ne ekzistas plena konscio kaj konsento pri bezono kaj utilo de la ŝanĝo, des pli ne pri la maniero kiel plenumi ĝin, sed la procezo estas startigita kaj diskutata. Admonaj estas ekzemploj de iuj fortaj neesperantistaj organizaĵoj kiuj estingiĝis ne farinte tian ŝanĝon ĝustatempe. Kuraĝigaj enmovadaj ekzemploj estas la virtualaj komunumoj de E@I (origine: *Esperanto ĉe Interreto*, nun *Edukado ĉe Interreto*) kaj *lenu.net* (kelkdek mila retkomunumo de kreantoj, helpantoj kaj uzantoj de la reta E-kursaro *lenu!*) kiuj ne havas oficiale registritajn kaj kotizpagantajn membrojn, sed kunigas kaj kunordigas agantojn en altintaj E-projektoj financataj el en- kaj ekster-Esperantujaj fontoj.

## Iniciatoj

**Jardeko de lingvoj.** Iniciato en la unua laborkampo sur la unua ebena – *la centra UEA*

La jaro 2008 estis *Jaro de Lingvoj* proklamita de Unesko kun slogano estis *Lingvoj gravas*. UEA ambicias, ke Unesko povus lanĉi *Jardekon de Lingvoj* kiel postsekvon de la *Jaro de Lingvoj 2008*, kaj planas kunligi sian agadon al ĝi. La celo de UEA por la jardeko estas enplekti la etnolingvan publikon kaj levi la nivelon de konscio – en kaj ekster la esperantistaro – rilate la gravecon de la lingvoj kaj lingvaj komunumoj kiel konservinda trezoro de la homaro, kaj rilate la toleremon kaj akceptemon al aliuloj kiel bazon por la konservado de tiu trezoro. La ĉefa tasko de UEA en ĉi tiu iniciato estas levi la profilon de Esperanto kiel aparte taŭga ilo por krei kaj konstantigi tian prilingvan konscion kun interkomunuma dimensio.

Efektive, la *Jardeko de Lingvoj 2011–2020* por UEA estas sinonimo de la dekjara laborplano kiun ĝiaj kreantoj uzas kiel kadron por listigi kaj kunordigi la asociajn celojn, esprimitajn intencojn kaj esperatajn laborfortojn.

**Projekto vizaĝoj.** Iniciato en la unua laborkampo sur la dua ebena – *la larĝa UEA*

Temas pri *vizaĝoj* de elstaraj esperantistaj kulturkreatoj kaj ilia konigo al la neesperantista publiko. La intenco estas, ke la landaj asocioj kaj aliaj lokaj agantoj produktu en etnaj lingvoj vikipediajn materialojn kaj verkojn pri diskonigindaj figuroj, kiuj kontribuis al la propra kulturo – emfazante la dialogemon, toleron kaj akceptemon al enmigrintoj kaj fremdaj landoj/ fonoj. La celo estas, ke la publiko kapablu pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado al la kulturo de la unuopaj landoj kaj de la mondo. La tasko de landaj kaj fakaj asocioj estos identigi vaste diskonigindajn vizaĝojn el sia loka aŭ faka medio kaj kunordigi la tradukadon de iliaj prezentoj alilingven. La *centra UEA* respondecos pri la reliefigado de la elektitaj vizaĝoj, produktado de taŭgaj dokumentojn en Esperanto kaj atentu la liveradon de iuj el ili laŭokaze en internaciaj forumoj, kie UEA reprezentiga.

## La rolo de ILEI

ILEI estas internacia faka organizo pri edukado kaj instruado fondita en la jaro 1949, kun landaj sekcioj kaj reprezentantoj en pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj. Ĝi unuigas instruistojn kaj instruantojn kiuj uzas Esperanton por ajna aspekto de sia pedagogia laboro. Ĝeneralaj celoj de ILEI estas: • edukado al estimo de la homo kaj al respekto de la vivo kaj de la naturo • progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.

Ĝia specifa tasko estas sistema laboro por enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto en ĉiuspeca instrumedio. Tio inkluzivas esplorado de pedagogiaj problemoj en la lingvo-instruado kaj interkultura edukado, instrukapabligadon, produktadon de instrumaterialoj kaj lerniloj, eldonadon de fakaj revuoj kaj komunikaĵoj, ekzamenadon, organizadon de fakaj konferencoj, kunlaboron kun ekstermovadaj fakaj institucioj k.c.

Kun tiaj celaro kaj taskaro ILEI estas adekvata partnero de UEA por la *Strategia laborplano “Jardeko de Lingvoj”* en kiu ĉefrolas edukaj agadoj al esperantista

kaj eksteresperantista publiko. Tiusence elstaras proponata planero, ke la *centra UEA*, kunlabore kun fakuloj el *ILEI* k.a., produktu ĉiujaran *Agadproponon por Lingva kaj Kultura Egalrajteco* en la stilo de broŝurita leĝpropono kaj, interkonsiliĝe kun lokaj esperantistoj respondecontaj pri la prisekvado, sendu ĝin al landaj ministroj pri edukado kaj aliaj eblaj koncernatoj. Ni, esperantistoj en Serbio, staras antaŭ la demando, kion ni povas fari, kaj kion ni faru, por realigi tiun iniciaton en nia medio?

*ILEI* estas rekte referencata en ankoraŭ kelkaj konkretaj planeroj, ekzemple:

Retaj kursoj, hejmpaĝoj, lerno-akcelaj kaj paroligaj projektoj ricevu emfazon. *UEA*, *ILEI*, *lernu.net*, *edukado.net*, *ESF* kaj aliaj koncernatoj, konsiliĝe kun la uzantoj de *lernu.net*, ŝtupe lanĉu modere pagatajn aldonajn servojn kaj integri tiajn aranĝojn en la financan strukturon de *UEA*, hibride inter la membreco kaj la simpla klienteco kaj mesaĝante tiamaniere, ke tiuj 'kliembroj' sentu apartenon.

Por plifortigi la ekzistantajn centrojn por instruado de Esperanto, *UEA* kune kun *ILEI* instigu la centrojn kunlabori inter si ankaŭ por oferti siajn servojn al neesperantistoj dezirantaj lerni Esperanton.

La *Estraro de UEA*, kunlabore kun *ILEI*, *A-komitatoj* kaj la *landaj asocioj*, akcelu la produktadon de lerniloj por la landoj/lingvoj, kie ili mankas.

Ĉiunivelaj esperantistoj, sub la gvidado de *ILEI* kun apogo de la *Estraro de UEA*, daŭre laboru kun instruaj instancoj je registara kaj aliaj niveloj por ke Esperanto estu instruata je oficiala nivelo en la lernejoj de unuopaj landoj.

*UEA* kaj *ILEI* starigu programon de instruista trejnado, kiel esencan elementon de la starigata komuna ekzamena branĉo "Instrukapablo", klopodante enkadrigi elementojn de tiu trejnado en la strukturojn de oficialaj edukaj instancoj kaj helpi al provoj konstantigi aŭ lanĉi oficialajn universitatajn kursojn.

Ĉio ĉi emfazas la gravecon de *Esperanto-Instituto de SEL* kiu plenumas la *ILEI*-agadon en Serbio. Ne ekzistas landa sekcio de *ILEI*, sed estas kelkaj individuaj membroj de *ILEI* en Serbio. Ŝajnas, ke venis tempo fondi la sekcion por plifaciligi kaj plisukcesigi la agadon de la *Instituto* kaj *SEL*.

## **Eŭropa E-agado**

Mondskale, la E-movado estas sendube plej forta kaj multnombra en Eŭropo, kie *UEA*, *ILEI* kaj *TEJO* havas plej multajn landajn asociojn, sekciojn kaj mem-



braron. Tamen, malkiel por aliaj kontinentoj, UEA ne havas *Eŭropan komisionon*. Tiun rolon estas supozata plenumi la *Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)*, sed ĝi kovras nur la teritorion de Eŭropa Unio, dum la ceteraj eŭropaj landoj restas ekster ĝi. Alia specifaĵo de EEU estas, ke la agadpolitiko kaj celdirektoj de ĝia Estraro ne ĉiam harmonias kun tiuj de UEA. Precipe diskutata estas la ambicio de la Estraro de EEU promocii Esperanton kiel lingvon de eŭropa identeco. Konsiderante la oficiale deklaritan politikon de EU rilate al la lingva kaj kultura diverseco kiel eŭropa valoro, oni esperas atingi subtenon kaj agnoskon de parlamentanoj kaj diplomatoj al Esperanto pro ĝia kontribuo al protektado de la lingva kaj kultura diverseco. Malgraŭ ekzisto de kelkaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto inter la eŭropuniaj oficialuloj, la ĝisnuna rezulto estas mala al la ambicio. El la rondoj de Eŭropa Komisiono venis firma respondo ke, laŭ ilia konsidero, Esperanto ne havas propran kulturon kaj estas gepatra lingvo de neniu eŭropa civitano, sekve ĝi neniel kontribuas al la kultura riĉeco de Eŭropo kaj ne povas esti oficiala eŭropunia lingvo.

Aliflanke, bonajn rezultojn donas kunlaboro kun fakaj neesperantistaj institucioj kaj unuopuloj kiam temas pri projektoj kiuj praktike utiligas Esperanton, demonstras ĝiajn valoron kaj utilon, kaj promocias ĝian kulturon. Vojmontraj estas projektoj de TEJO, E@I, iuj E-klerigejoj, kelkaj sekcioj de ILEI, kaj EEU mem, francataj el diversaj eŭropaj fondaĵoj (EYF, YOUTH, Comenius, Grundtwig k.c.) kaj aplikado de la *Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj* al ekzamenoj de Esperanto. Dume la ladaj asocioj de UEA, sekcioj de ILEI kaj TEJO, fakaj asocioj kaj E-klerigejoj en Eŭropo daŭrigas sian tradician agadon serĉante novajn vojojn por adaptiĝi al la realaj agadcirkonstancoj, kaj iom-tiom renovigas sian mebraron per novaj kaj junaj esperantistoj kiu lernis la lingvon ĉefe per retkursoj, sed ne nur tiel.

## **E-agado en Serbio**

Kontraste al multjara rezultoriĉa agado kaj abunda kulturprodukto, inkluzive de gravaj internaciaj E-kongresoj, seminarioj, lingvaj festivaloj kaj alitipaj E-renkontiĝoj en Serbio okazitaj en la lasta jardeko kaj plu okazataj, la movado en Serbio stagnas, eĉ malkreskas dum la lastaj 15 jaroj. Sed ĝi havas konsiderindan nombron da altkvalitaj esperantistoj – verkistoj, tradukantoj, organizantoj, pedagogoj, vortaristoj, ĵurnalistoj – kiuj ankoraŭ scipovos retranspeni la gvidadon de la Serbia E-movado kaj revenigi ĝin al la vojoj de celtrafe organizita kaj kontinue kunordigata poresperanta kaj peresperanta agado landnivela kaj internaciskala.

La profesie kaj altkvalite organizita *Tria kongreso de serbiaj esperantistoj* povas esti instiga evento por nova turnopunkto en la historio de Serbia Esperanto-Ligo, post kiu ĝi aŭ revivos plenspire, aŭ definitive formortos. La Strategia laborplano de UEA povas esti inspira dokumento por nova agadstilo. Ĝi estas bona bazo por diskuto, mempritakso, decidoj kaj ekpaŝoj pri fareblaĵoj kaj farindaĵoj.

## Konkludaj konsideroj

En la proponita kaj diskutata *Strategia laborplano de UEA por la jardeko 2011 – 2020* mankas kelkaj detaloj kiuj plifidindigus ĝian strategiecon, ekzemple:

Unu el bazaj ekirdokumentoj por strategia planado kutime estas pritaksa analizo de rezultoj el la antaŭa planperiodo. Ĝia manko en ĉi tiu transira jaro inter du strategiaj planoj eble per si mem signifas senvortan tamen elokventan pritakson de la strategiplanaj atingoj de UEA el la antaŭa jardeko.

Ne estas klara la dezirata stato de la organizo/movado/E-komunumo /homaro post la 10 planaj jaroj. Ekzemple, el la vidpunkto de *Konsciigo pri lingvoj kaj komunumoj*, kiun nivelon de la konsciigo inter kaj ekster la esperantistaro, aŭ de aliaj planparametroj (ekzemple nombro de prezentitaj vizaĝoj, amplekso kaj efiko de la prezentoj, aŭ nombro de universitate diplomitaj E-instruistoj) UEA deziras atingi fine de la planperiodo, kiun diferencon inter la plankomenca kaj planfina niveloj? Kaj kiel mezuri ĉiujaran progreson kaj la finan rezulton por adekvate direkti la planon kaj havi indikilojn por la posta planperiodo?

Mankas bilanco de resursoj kaj agadfortoj kompare kun la streboj, kaj analizo de favoraĵoj kontraŭ malfavoraĵoj en la ĉirkaŭaĵo kun bilanco de organizaj fortoj kontraŭ malfortoj, sen kiuj praktike ne eblas konstrui fidindajn kaj direkteblajn trijarajn kaj jarajn operaciajn laborplanojn.

Malgraŭ la *profesiigo* kiel principo kaj unu el la tri gvidaj agaddirektoj deklaraĵoj por la antaŭa strategia jardeko, la procedo mem de la strategia planado de UEA daŭre baziĝas sur vaste malferma diskuto de bonvolaj agemuloj kaj kompetentaj respondeculoj, sed sen profesinivele preparitaj analizoj kaj planparametroj.

Tamen, eĉ kun la listigitaj mankoj, ĉar pli bonan ni ne havas, la *Strategia laborplano de UEA* estas grava dokumento en kiu ni, ordinaraj surterenaj agantoj, trovu inspiron kaj kialojn por bilanci proprajn fortojn kaj malfortojn kaj fari nian eblon konforme al nia idea orientiĝo kaj praktika sindediĉo al Esperanto.



